

2<sup>o</sup> JARO.

GENIO

N<sup>ro</sup> 9a

# TRA LA MONDO.

·TUTMONDA·ILUSTRATA·REVUO·ESPERANTISTA·  
MARTO  
1907.

AFRIKO

AMERIKO

## GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

**ĈIULANDA VIVADO** : Internacia ciketo pri edukado. — Raporto de Pro *Th. Rousseau* laŭ dokumentoj de Sroj *Field* (NOV-ZELANDO), *Guitteny* (TAHITO), *Zacherl* (BAVARUJO), *Robinson* (U. Ŝ. de A.), *Ŝin Ivamura* (JAPANUJO), *Svaĉina* (BOHEMUJO), diversaj (FRANCUJO), *Fino Schenk* (SVISUJO).

**MUZIKO** : Pri *Stabat* de *Rossini*, de *E Bacquet* (FRANCUJO).

**TRA LA MONDO** : Rio de Janeiro, de *E Backheuser* (BRAZILUJO).  
La amerikana vivo, de *E. Fairfield Mac Pike* (U. Ŝ. de A.).

**SCIENCJOJ** : Aerveturado, de *Marcel Finot* (FRANCUJO).

**ĈIULANDAJ KUTIMOJ** : La bulgara edziĝo, de *Leŭt<sup>o</sup> Silvestriev*, kun il. de *Georgiev* (BULGARUJO).

**PRI ESPERANTO** : Ĉirkaŭ la Kembridĝ'a kongreso, de *La Trio por la Tria* (ANGLUJO). La dudeka Jubileo de Esperanto, de *A. Montrosier*. Kroniko kaj Bibliografio.

**FELIETONO** : Tertremo, de *Amfiteatrev'* (RUSUJO) kaj *Leo Belmont* (POLUJO).

**ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO** : Veresĉagin, de *N. Kabanov*. (RUSUJO). — *Carducci*, de *J. Meazzini* (ITALUJO). — La kartagaj festoj, de *C. Combet* (TUNISUJO). *Frederiko Soler*, de *Bremon y Masgrau* (KATALUNUJO).



UNU KAJERO 75 CENT.

CAROLINE  
OXENFORD, EV.

## AL MIAJ LEGANTOJ.

Mi havas la plezuron prezenti min al vi, karaj gelegantoj, kun nova vizaĝo, ŝuldata al mia malnova amikino, via ankaŭ, kiu faris al mi la surprizon min sendi ĉarman maskon por la karnavalo.

Ĝin mi konservos, esperante ke ĝi allogos tiujn, kiuj min vidos, kaj donos al ili la deziron min senmaskigi... t. e. turni la paĝon! « TRA LA MONDO ».



## La dudeka Jubileo de Esperanto.

Kelke da tempo antaŭ la Ĝeneva Kongreso, nia fervora amiko, Otto Simon el Ung Ĥadisĉ, havis bonegan ideon pri « ĝenerala festa tago de la Esperantistaro ».

Tiun ideon plene aprobis D<sup>ro</sup> Zamenhof mem, en letero skribita al « Germana Esperantisto », organo kies gravecon konas niaj legantoj.

Tiun ideon, denove, li aprobis dum la kongreso mem, kiam la propono de S<sup>ro</sup> Otto Simon estis publike prezentata. Li rifuzis nur, pro sia konata modesteco, ke oni elektu — kiel deziris S<sup>ro</sup> Otto Simon — la daton de lia naskiĝo.

Fine, dum intervjuo kiun mi prenis al li, li ankoraŭ konsentis pri la graveco de festo de l' esperantistoj okazanta la saman tagon en ĉiuj ĉefaj urboj de ĉiuj landoj, aprobante tute la opinion ke « tiaj festoj, okazantaj samtempe, preparolataj de la tutmonda gazetaro, farus grandegan impreson al la publiko; nia ĝenerala festo estus kvazaŭ la tago de l' 1<sup>a</sup> de Majo por la laboristoj, kies graveco devenas precipe de ĝia universaleco, kaj de l' atentigo de la gazetaro, pro tiu universaleco kaj ĝeneraleco mem ».

Tiuj diroj impresis multajn personojn, kiuj skribis al mi; kaj unu el ili, S<sup>ro</sup> Tabenski, alia fervorulo kiel S<sup>ro</sup> Simon, prenis sur sin la taskon enketi pri la afero.

Ĝi konsistis nur elekti taŭgan tagon. D<sup>ro</sup> Zamenhof estis konsiderinta kiel akceptebla, dum la intervjuo, se ne la naskiĝan tagon de l' elpensinto, almenaŭ tiun de l' elpenŝaĝo, t. e. la 17<sup>an</sup> de Dec. (\*); sed tuj lia frato D<sup>ro</sup> Leon Zamenhof, ĉeestanta, rimarkigis ke tiu tago, tro proksima de la Kristnasko, ne konvenus por multaj personoj.

Tiun timon pravigis tute la enketo de S<sup>ro</sup> Tabenski; sed ĉiuj personoj demanditaj juĝis plene bona kaj elektinda la tagon de la *oficiala naskiĝo* de Esperanto, proponita de li.

S<sup>ro</sup> Tabenski rimarkis efektive, kaj rimarkigis, ke alia tago bonege taŭgas: « tiu, kiam nia genia majstro prezentis al la mondo sian mirindan kreitaĵon, kaj kiam la ideala homo grandanime oferis sian laboraĵon al la homaro, dezirante neniam rekompencon.

« *Li, kiam li naskiĝis, estis la 21<sup>an</sup> de Julio 1887, en la vilaĝo de S<sup>ro</sup> Zamenhof, en la provinco de Lublino. (\*\*)* La dato estas certa ĉar, laŭ la rusa leĝo, sur unua libro: D<sup>ro</sup> Esperanto — *Lingvo Internacia*, troviĝas la jena regna oficiala surskribo: *Permesito precipi de la cenzuro, Varsovio, 21<sup>an</sup> de Julio (nova stilo).* »

« Nu, mi havas okazon bone festi nian feston antaŭ la Kembridge Kongreso, kiel Jubileon dudekjaran de l' apero, en la mondo, de nia kara lingvo: 21<sup>an</sup> de Julio 1907; kaj la tago estos tre oportuna ĉar, feliĉe, ĝi estos dimanĉo ».

Jam multaj personoj respondis al la alvoko de S<sup>ro</sup> Tabenski, el Francujo, Britujo, Germanujo, Rusujo, Svedujo, Svisujo, Ameriko, k. t. p... Tre plezure mi konigas tiujn rezultatojn kaj volonte mi admonas nian legantaron organizi feston, kiel eble plej gajan, la 21<sup>an</sup> de Julio.

Dum tiu festo, en la entuziasmo kiun naskas la kuniĝo de esperantistoj, pli ol unu samideano — kiu izolita ne estus pensinta viziti « La Trian » decidiĝos kaj dikigos la rangojn de l' kongresanoj. Kaj la festo jam altiros la atenton de la ĉiulandaj gazetoj kiuj, tiel favore preparitaj per *lokaj* festoj, kiujn ili povos okule taksu, plivole raportos pri kaj por la *malproksima* Kongreso, videbla por la plimulto da ili nur per okuloj de ia el iliaj legantoj, iĝanta okaza kunlaboranto.

Ĉar la ideo ne estas mia, sed apartenas al du aliaj samideanoj, S<sup>roj</sup> Otto Simon kaj Tabenski, tute senĝene mi povas ĝin subteni, petante miajn kunfratojn, ke ili ĝin konigu al sia legantaro, kaj ĝin energie apogu.

Oni ne forgesu, ke **Doktoro Zamenhof tute aprobas la ideon.**

La 21<sup>an</sup> de Julio 1887, li metis sian tutan esperon en la frukton de longaj laboraj jaroj, subskribante sian verkon per vorto, neniam mortonta, « D<sup>ro</sup> Esperanto ».

La esperantistoj ne povas preterpasi, indiferentaj, la 21<sup>an</sup> de Julio 1907. Dudek jaroj poste!

A. MONTROSIER.

En nia estonta numero ni komencos presi la nomojn de la grupoj intencantaj festi la *Dudekjaran Jubileon de Esperanto*. Estos efektive bonege se iuj povos interrilati por ke la festoj najbaraj, sin kombinante unu kun la aliaj, havu la plej grandan resonadon eblan.

Plezure ankaŭ, ni ricevos la proponojn de la organizantoj kaj iliu resumos.

(\*) Proponante tiun daton, D<sup>ro</sup> Zamenhof aludis la 27<sup>an</sup> de Dec. 1878 « kiam kun entuziasmo neniam atingita, mi kaj kelkaj kungimnazianoj festis ĝin (la lingvon) en Varsovio, antaŭ ol disigi ». Tio estis la neoficiala naskiĝo de Esperanto.

(\*\*) Tiu, kiuj ne ĝin konas, legu la admirindan leteron en kiu D<sup>ro</sup> Zamenhof rakontas « kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian » (*Esperantaj Prozaĵoj, Hachette & C<sup>ie</sup>, 2 fr. 50.*)

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al:

**Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.**

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1<sup>a</sup> Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio : British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.

Svedujo : S<sup>ro</sup> P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUIJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

# Premio al niaj legantoj.



Por esti agrabla por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorlogon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude.

En la du kvalitatoj, la poŝhorlogo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr.

Por Rusujo, aldoni 5 fr. por la transporto kaj limdepago.

## KRONIKO KAJ BIBLIOGRAFIO.

De longe ni estis sen sciigoj pri du malnovaj kaj fervoraj amikoj de Esperanto ankaŭ kunlaborantoj de « Tra la Mondo »: Sinjoroj Poŝtnikov kaj Beauchemin.

Antaŭ ne longe ni ricevis leterojn de ili: la unua sciigas nin ke, lasinte siajn militajn okupojn en Vladivostok, li transmigris en U. S. de A., kie li devis lerni novan lingvon (la anglan), momente forlasante devige Esperanton: la letero sendita al ni estas la unua, kiun li skribis de unu jaro.

Ĉar nia amiko estis en San Francisko, kiam okazis la neforgesita tertremego, ni timis ke la malprospero okazis al li. Ni ĝojis eksciante ke nur okupegoj kaŭzis lian silenton; kaj tiuj, kiuj konas lian sindonon al Esperanto ĝojos kiel ni.

La dua, longe malsana post la Boulogne kongreso, rekomencas sian agadon por la kara lingvo; kaj afable li pensis tuj al « Tra la Mondo » sendante artikolojn kun ilustraĵoj. ~~Tom da tempo~~ post la ricevo de tiuj dokumentoj, ni legis plezure artikolon de li en « The American Esperantist ».

Ĝojante pri lia resaniĝo, ni sendas al nia amiko, la simpatiojn de nia legantaro.

Oni scias ke okazis en Londono, dum la 1906<sup>a</sup> jaro, grava aŭstria ekspozicio. La esperantista grupo de Praha helpis al la organiza komitato, sendante al siaj tutmondaj amikoj, Esperante, raportojn pri la bohema sekcio. Tiuj ĉi, post traduko diverslingven, helpis por la diskonigo de la ekspozicio.

Ekzemple, anglaj esperantistoj vizitis *are* la ekspozicion en Earl's Court (London').

Pro tiuj servoj faritaj per Esperanto al la organiza komitato, la esperantista grupo en Praha ricevis honoran diplomon subskribitan de la prezidanto de la komitato, de l' sekretario kaj de bohemia eminentuloj.

(Laŭ letero de S<sup>ro</sup> V. Riegel, el Praha).

Dum la korekto de l' presprovaĵoj ni vidis en la 2<sup>a</sup> numero de « Časopis Českých Esperantistu » kopion de la diplomo. Ni komprenas ke niaj amikoj estas fieraj pro ĝi, kaj pro tiu okazaĵo diskoniginda.

« Lingvo Internacia » ĵus reorganizigis. Pro siaj profesiaj laboroj, S<sup>ro</sup> Paul Fruictier, al kiu Esperanto tiom ŝuldas, devis forlasi la redaktadon de la gazeto.

Tiu ĉi aperas nun monate anstataŭ duonmonate. Tiu fakto montras, unufojon plue, kiom malfacila estas la eldonado de Esperanta gazeto, kaj pruvas ke, kiam ekzistas bonaj, seriozaj, fidindaj tiaj gazetoj, nia samideanaro kaj nia gazetaro devas ilin serioze apogi.

La tri kajeroj, jam aperintaj, de la nova eldono estas tre kontentigaj kaj ebligas esperi ke nia malnova organo reprenos sian tutan prosperon.

Ni povis nur anonci la reaparon de « Esperanto Journal » en nia lasta numero.

Ĝia plano estas bonega. Ĝi estos organo por societoj kaj radaroj utiligantaj Esperanton: konsulejoj, oficejoj, k. t. p. Tiel, la dua numero enhavas, inter aliaj, interesajn sciigojn pri la internacia Socio de leĝoscienculoj fondita en Genève.

Bona ideo estas enpresi kvinlingve, en ĉiu numero, unu artikolon pri praktika apliko de Esperanto. Tio estas bonege kompreni, kiel nun devas esti farata la propagando.

Nun, dank'al la progresoj faritaj de Esperanto, oni ne plu bezonas esperigi pli malpli dubajn servojn estontajn: oni povas montri rezultatojn akiritajn, servojn certajn jam faritajn per Esperanto, kaj tio estas la vera, fruktodona farota propagando.

Laŭirante tiun vojon, nun eblan, « Esperanto-Journal » helpas certe tre efike niajn progresojn. La ĵurnalo havas tre klerajn korespondantojn en diversaj landoj kaj enpresas gravajn artikolojn pri la moderna vivo.

Ĝi ŝajnas definitive elirinta el la komencaj malfacilaĵoj kaj ni gratulas pro tio ĝian sindonon fondinton, S<sup>ron</sup> P. Berthelot, kaj la nunan redaktoron, la ageman sekretarion de Internacia Scienca Oficejo, S<sup>ron</sup> H. Hodler.

Ni rememorigas ke « Esperanto-Journal », kiu aperas duonmonate, estas aĉetebla en la stacidomoj francaj, svisaj kaj belgaj.

Esperanto à l'usage des Français, de H. E. Palmer. Jen nova lernolibro, kies legado multe interesas min.

Instrui kion ajn, estas jam malfacile por neprofesiisto; sed ankoraŭ pli malfacile estas instrui fremdan lingvon. Kiom da disputoj inter la anoj de la senpera metodo aŭ natura, kaj de la pera aŭ per traduko!

Kiun devas elekti la fervorulo kiu, ian tagon, iĝas profesoron pri Esperanto? Unua problemo,

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR  
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

*Foto-Revuo Internacia*

ĈEFREDAKTORO: CH. VERAY

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. por ĉiuj landoj.

## ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoĵoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monopapere.



## ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. — 11 f 50 la kesto da 2 boteloj  
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ANLANDE. — 4 f ĉiu botelo premita en S<sup>t</sup> Etienne, impostoj kaj transporto plua.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremduloj:

J. B. Brunon-Chauvet  
S<sup>t</sup> Etienne (France).

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

## Viskio Esperanto

Registered trade mark N° 270,042. Marque déposée N° 13,195. Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

### Buchanan, Scott & Co

GARTHLAND STREET,  
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

## Campanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo  
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.

Ĉe S<sup>ro</sup> Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France.

## SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exibard » (Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, *ordonata de ĉiuj kuracistoj*, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

**Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C<sup>ie</sup>,**  
102, rue de Richelieu, PARIS.

## L'Internacia Signo

estas la « **VERDA STELO** » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kummona mendo). Ĉe S<sup>ro</sup> Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

MILKA  
VELMA  
NOISETTINE  
**Suchard**

LA BONGUSTEGAJ  
ĈOKOLADOJ  
POR MANMANGI.

jam grava, kaj la elekto farita, kiel ĝin apliki? Dua problemo, ankoraŭ pli grava, ĉar ambaŭ metodoj ebligas sukceson, kondiĉe ke ili estas lerte aplikataj.

La celo de S<sup>ro</sup> Palmer estis, ja, montri per libro kiel oni povas apliki la naturan metodon, kiu estas esence voĉa.

En antaŭparolo des pli interesa, li priskribas sian metodon, *la instruajn rimedojn*; klarigas tiu farotan por sukcesi *pensi per la lingvo*; donas fine konsilojn por la lernanto kiu studos sen profesoro.

La metodo mem de S<sup>ro</sup> Palmer konsistas:

1<sup>o</sup> Logike *sciigi*, t. e. konigi la ĉefajn regulojn kaj la signifon de l' fundamentaj vortoj. Tiuj sciigoj estas donitaj france.

2<sup>o</sup> *Instrui*, t. e. igi la lernanton kapabla apliki sensanceliĝe la regulojn ĉiokaze. Por tio, oni devas doni al li multajn diversajn okazojn por uzi la regulojn kaj vortojn sciatajn.

En tiu dua parto sidas precipe la karakterizecon de la metodo Palmer. Ĉar ĝi estas fundamentita sur la parolado, la demandaj vortoj ludas en ĝi ĉefan rolon kaj, konsekvence, la rilataj vortoj respondaj. Do, sen peno, ludante, la studento lernas *ĉiujn* tiujn vortojn — kaj ne nur kelkajn dum la tuta daŭro de la lecionoj. Iom post iom li jonglas per ĉiuj reguloj de la lingvo — ĉiam dank' al demandaj kaj respondaj frazoj, kies malfacileco kreskas *metode*.

Ofte, post kursoj, iaj personoj diras: komence, Esperanto ŝajnis facila; kaj poste, mi trovas ĝin suface malfacila. La facileca impresio devenis de la simpleco de l' reguloj. Pri Esperanto estas simple *sciigi, informi*. La posta ŝajna malfacileco devenas de tio, ke oni ne sciis tiel bone *instrui*.

Mi kredas firme ke la volumo de S<sup>ro</sup> Palmer, per la klarigoj donitaj de li pri la maniero instrui, faros multe da servoj al bonvolaj esperantistaj profesoroj, do al la lingvo mem, pligrandigante la nombron de samideanoj ĝin uzantaj korekte kaj facile, kaj precipe malpligrandigante la nombron de l' senkuraĝiĝintaj.

La volumo tre lukse eldonita, kun granda zorgo pri la malsamaj presiloj, estas nova tipografika sukceso por S<sup>ro</sup> Witteryck (fr. 1.25 ĉe la eld. — fr. 1.50 afr. — 4, Nouvelle Promenade, Bruges Belgique).

Nia amiko Witteryck, aliparte, ne ŝparas siajn penadojn. Tiun ĉi vintron li faris samsemaj 3 kursojn deklecianajn: france, flandre, angle.

Nun li kunigas en sama supera kurso, devige nur *Esperante*, la gelernantojn de l' elementaj.

Dume, la sek. de l' grupo, S<sup>ro</sup> Van Weyenbergh, donas, france, gesinjoran kurson.

Jen bona aktiveco, dank' al kiu Bruĝo iĝas iom post iom, kun siaj 140 anoj, serioza esperantista centro.

La kreskanta sukceso de la presejo Witteryck, kiu tuj de l' komenco rimarkigis sin, pro ĝiaj belaj eldonaĵoj, meze de la malmultaj komencaj esperantistaj presistoj, kaj konservis lokon antaŭ multe partoprenis en tiu bona Bruĝa agado.

Ni aldonu, fine, ke S<sup>ro</sup> Witteryck estas « oficiala tutmonda konsulo »: 10, Quai des Ménétriers. Kinematografas la belan punton, tutmonde faman, ĝin aĉetu per li.

STELETO.

Diversaj eldonaĵoj:

« La katolikaj esperantistoj ĉe la II<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto en Ĝenevo (1906) », 20 c. afr. ĉe ĉiuj libroj esperantistaj.

« Wörterbuch Esperanto-Deutsch » plenigas tute konvene, por la esperantistoj sciantaj la germanan lingvon, la vortaron « Deutsch-Esperanto » pri kiu ni parolis en la decembra numero. Oni trovas en ĝi multe da tiuj novaj radikoj kiuj, laŭ la vortoj mem de D<sup>ro</sup> Zamenhof, ne estas altrudataj, sed kies kono, tamen, estas tre utila por legi senembarase ĉiujn verkojn. Ĝia akiraĵo estos do tre oportuna: 2 fr. 75 afr.; bele bindita 3 fr. 25.

« Unua protestanta Dioservo » en Genève, enhavanta la predikon en Esperanto faritan de nia kunlaboranto pastro J. C. Rust, preĝojn, ekleziajn kantojn, k. t. p. Bonega propagandilo por protestantoj (Ĉe pastro Schneeberger, Laufon, Svisujo. 50 cent).

Aliaj kongresaj memoroj: la 6<sup>a</sup> numero de « Flugila Stelo », revuo, por Esperanta Stenografio, enhavas stenogramon pri la parolado de D<sup>ro</sup> Zamenhof (Jare: 2 fr. Ĉe pastro Schneeberger).

Poŝtkartoj kun la fotografajo de la statuo de Esperantistino, de S<sup>ro</sup> Schaufenbühl, priskribita kaj montrita en nia aŭg. numero (10 ekz. afr. 1 fr., Oficejo de Esperanto kaj Stenografio, Laufon Svisujo).

Pro manko de spaco, ni donos la finon de la Bibliografio en la proksima numero.

### El Japanujo.

Oni multe rimarkis niajn ilustritajn dokumentojn pri Japanujo. Ni havos baldaŭ la plezurplena prezenton al nia legantaro kelkajn el niaj amikoj de la « Imperio de l' Suno leviganta ».

Ni ĵus ricevis kuriozan artikolon de nia bonega kunlaboranto Steenbuch pri la japana skribado. Liaj restantaj interesaj sciigoj pri la knabina vivado, ni enigos en la raporton pri la internacia enketado pri edukado.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de


« Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adresŝanĝojn **NUR** laŭ peto **AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ**.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas represi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata **ĈIAM CITI LA DEVENON DE L'ARTIKOLO**, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Ni respondas nur al la leteroj akompanataj de la respondeca poŝtmarko.





Kopirajto

EN BOHEMA LERNEJO: EKSPOZICIO DE INSTRUILOJ.

Fot. Svacina.

## Internacia enketo pri Edukado

15 Landoj partoprenintaj.

La ambaŭseksa edukado. — La tagmanĝo ĉe la lernejo. — Promenadoj kaj manlaboroj. — Libertempoj: Kristnasko. Novjaraj tagoj en Japanujo. Finjaraj ekspozicioj en bohemiaj lernejoj. — Infanaj festoj en Svisujo.

Kredeble, ankaŭ en Nova Zelando, la infanoj estas petolemaj; ĉar, laŭ letero de S<sup>ro</sup> Field, oni devas kelkafoje uzi por ili punojn iom severajn. Se infano faras malbonaĵon, oni frapas sur ĝian manplaton per kano aŭ rimeno, kaj se ĝi estas neplibonigebla, oni ĝin forigas. Tiujn rimedojn oni povus konsili al S<sup>ro</sup> Guitteny, por provo, sed Borabora estas franca insulo, kaj en Francujo, eĉ en kolonioj, estas tute malpermesate frapi la geknabojn, por edukado.

Speciale estas notinde, ke, en la lernejo de S<sup>ro</sup> Guitteny, la knaboj estas kun knabinoj; sed ĉe tabloj apartaj, kaj la knabinoj antaŭ la knaboj. Generale, en la sudaj kaj katolikaj landoj, la lernejoj ne estas por ambaŭ seksoj.

En Bavarujo, skribas S<sup>ro</sup> Zacherl, el Passaŭ, eduk-ejoj por geknaboj ekzistas nur por tiuj, kiuj perdis siajn gepatrojn. En Francujo ekzistas ankoraŭ kelkaj miksaj lernejoj, en la malgrandaj kaj malriĉaj vilaĝetoj, sed, pli kaj pli, oni disigas la infanojn. Provo de kunedukado generale malsukcesis en Francujo, — oni ankoraŭ tie havas en la memoro la skandalon de Cempuis, — kaj renkontis ĉiam la kontraŭstaron de la burĝaj kaj religiaj principoj.

En la nordaj regionoj, male, tiu ideo estas pli facile akceptata. Sur ĉi suba fotografiaĵo, sendita al ni de S<sup>ro</sup> Samppa Luoma, oni vidas la infanojn duope, knabo kun kuabino, ĉe sama pupitro. En Ameriko, kiel oni povos legi en la bonega raporto al ni sendita de S<sup>ro</sup> Robinson, preskaŭ ĉie estas uzata la kunedukado por ambaŭ seksoj.

Kaj en la fotografiaĵo, kiu kuŝis komence de nia raporto, kaj kiun ni ŝuldas al S<sup>ro</sup> Alois Stepan, instruisto en Bohemujo, oni ankaŭ povas vidi geknabojn edukitajn en la sama lernejo.

La tagmezaj manĝoj, pri kiuj jam mi iom parolis, estas ĉie malfacile solvebla afero, en la popolaj

lernejoj. Kiam la infanoj loĝas tro malproksime, oni devas ilin nutri en la lernejo, kaj kompreneble kiel eble plej malkoste. Por tiu celo, oni kreis en Francujo, lernejajn manĝojn. Ĉar la instruado estas deviga kaj senpaga, oni ne povas postuli monon al la gepatroj, por pagi tiujn manĝojn. En la urboj iom grandaj, la elspezoj estas pagataj de la publika kaso. La geknaboj ricevas ĝenerale tre taŭgan nutraĵon: supon, viandon kaj legomon aŭ rizon, aŭ makaronion, kaj ofte fromaĝon. En la malriĉaj vilaĝoj, ĉiu infano alportas ion; iu, kunportas botelon da lakto, alia bulbojn, alia terpomojn, alia iom da graso, ĉiuj pecon da pano. La manĝoj estas preparitaj de virino dungita por tio, aŭ kelkafoje de la edzino de l' instruisto. Oni aranĝas manĝo-ĉambron en la lernejo, certe ne tre luksan, almenaŭ en la malgrandaj urboj kaj vilaĝoj, sed tamen puran kaj konvenan. Sur la tablo ne estas, ĝenerale, tablotukoj, sed ili ne estas tamen anstataŭitaj de folioj de bananarboj kiel en la hejmoj de la lernantoj de Tahiti.

La letero de S<sup>ro</sup> Guitteny al ni ankaŭ sciigas interesajn detalojn pri la libermomentoj de la infanoj. Ĉiun vendredon, posttagmeze, ĝis la tria horo, la knabinoj kudras aŭ plektadas ĉapelojn el enlandaj kanoj. La knaboj faras gimnastikon; la cetero de la tago estas uzata por kantado. Ankaŭ oni legos, en la raporto de S<sup>ro</sup> Robinson, ke, en Usono (U. S. de A.), oni instruas infanojn pri kelkaj permanaj laboroj. Persone mi opinias ke tio estas treege utila: la geknaboj, kiuj ĵus finis elementaran lernadon, havas sufiĉe plenan konon pri la spiritaj aferoj, sed bedaŭrinde tro malofte povas uzi lerte siajn manojn. En Nova Zelando, oni bone komprenis tion, kaj tie la knaboj lernas ĉarpentarton kaj faras militistajn ekzercojn, dum knabinoj lernas kuirarton kaj kudrarton. Ĉiuj faras gimnastikon.

Oni ankaŭ interese sciigos, ke en tiu lando, oni neniam uzas librojn por studadi naturon. La geknaboj do ofte promenas ekstere sur la kampoj, kaj tie, nur observante kion ili vidas, kaj preskaŭ ludante, ili lernas la elementojn de zoologio, botaniko, geologio, astronomio, meteorologio k. c. Ni vidas, ke tiu metodo estas sisteme kaj sukcese uzata en duagrada lernejo «Ecole des Roches» en Francujo.

En Borabora ankaŭ, S<sup>ro</sup> Guitteny faras oftajn promenojn kun siaj lernantoj; la sabato estas libertago, kaj ĉiuduonmonate ili ekskursadas ĉirkaŭ sia insuleto.

En Finnlando, estas rimarkinde, ke la plej granda libertempo estas je Kristnasko, kiam, en ĉi tiu lando, la suno preskaŭ ne aperas en la ĉielo, kiam neĝas, frostegas, brrr...! Sed ni ja scias, per artikoloj jam senditaj al nia revuo, de samideanoj finnaj aŭ svedaj, ke en ĉi tiuj dum vintro mallumaj landoj, la malvarmega sezono estas eble la plej ŝatata de la loĝantoj, ĉar ĝi plej bone taŭgas por la hejmaj amuzoj kaj ĝojoj.

« En Japanujo, skribas al ni nia bonega japana samideano S<sup>ro</sup> Ŝin Ivamura, el Arnarube, provinco de Hjogoken, Kristnasko ne estas atendata de la geknaboj, ĉar ili ne estas kristanoj kaj ne konas Biblion, nek eĉ Kriston mem. Sed la ekjaraj tagoj estas atendataj de ili, laŭ nia kutimo. Je tiuj tagoj, geviroj vestas sin bele kaj preĝas Dion; poste la tuta familio manĝas *moĉi*. La unuan de Januaro, geviroj vizitas en ilian domon siajn amikojn, kiuj, baldaŭ poste, revizitas ilin. La samon oni faras dum tri tagoj. La geknaboj iras en la lernejon kaj ili kaj iliaj instruistoj vidas, modestege, la fotografadojn de Lia Imperiestra Moŝto kaj de Ŝia Imperiestrina Moŝto. Ili kantas la nacian kanton nomatan *kimigajo*, kaj la lernejestro legas *ĉokuĝo* tre modeste, kiu estas la Imperia Skribado rilate al Edukado. Tiu ĉi ceremonio estas nomata *Ŝinnenhaigaŝiki*. Je tiu sama tempo, oni metas *kadomatsu* ĉe pordegon de ĉiu domo. *Kadomatsu* estas paro da kunligitaj pinoj kaj bambuoj. »

En Bohemujo, kiel en



Kopiraĵo

Fot. Samŝa Luoma.

GELEARNANTOJ EN LINNA LERNEJO.

Ĉe ĉiu skribotablo sidas knabo kaj knabino.

helpiloj. Bohemaj lernejoj havas sufiĉe da ili. Almetitaj ilustraĵoj montras tiun ekspozicieton, aranĝitan de la 30<sup>a</sup> de julio ĝis la 6<sup>a</sup> de aŭgusto, la lastan jaron, en triklasa popola lernejo, en Sud-Bohema vilaĝo Purkarec. Ĉi tiu ekspozicieto enhavis pli ol 1470 ekzemplerojn, el kiuj multajn helpilojn, kiujn la tiea ĉefinstruisto S<sup>ro</sup> Karel Svačina mem preparis. Tiaj ekspozicioj havas bonan celon: altiri al lernejo multajn novajn bonfarantojn kaj montri al la gepatroj ĉiujn progresojn en instruado.

Por la bohemaj gelernantoj eliras multaj belaj kaj zorge redaktitaj periodaj gazetoj. La redaktoroj estas plej ofte instruistoj. Ĉiu bohema lernejo posedas ankaŭ riĉan bibliotekon por siaj lernantoj.»

En Francujo, la plej granda libertempo komencas plej ĝenerale en la lastaj tagoj de julio kaj daŭras du monatojn. En la malgrandaj vilaĝoj, tio okazas tute sen ceremonio. En la urbaj popolaj lernejoj, male, kaj en ĉiuj dugradaj lernejoj, oni finas la instruadan jaron per festo, kiun oni nomas: disdonado de premioj. Tiu festo havas du partojn: la unua treege enuiga por la lernantoj, la parencoj kaj la

profesoroj, konsistas el solenaj paroladoj: la unua de la prezidanto de la ceremonio, plej ofte iu politika viro, prefekto, urbestro, deputito aŭ ankaŭ kelkafoje generalo; kaj la dua de unu el la profesoroj, kiu ĉiam traktas elokvente gravan temon kvazaŭ li volus, antaŭ forlasi siajn lernantojn, fari al ili lastan lecionon. La dua parto estas pli ŝatata de la infanoj, almenaŭ de la laboremaj; ĉar tiam oni disdonas al ili premiojn: ĉiam librojn, kelkafoje interesajn kaj utilajn, sed bedaŭrinde tro ofte, nur lukse binditajn. Tamen




Kopiraĵo

Fot. Alois Stepan.

GRUPO EL GELEARNANTOJ BOHEMAJ.

Multaj infanoj marŝas nudpiede, kiel Arabetoj.

tiun ceremonion tre ŝatas ankaŭ la plimulto el la familioj; ĉar, la ĉambrego bele ornamita, en kiu ĝi havas lokon, la simfoniaj akordoj de la muzikistaro de la regimento, la grava ŝajno de la profesoroj vestitaj per roboj kun diverskoloraj ornamoj, la elegantaj tualetoj de la sinjorinoj faras ĉiam impreson sur la spiriton de la ĉestantaro, pro la amo al la belvidaj kaj solenaj ceremonioj, kiun ĉiu Franco havas en sia koro.



Kopirajto.

EN BOHEMA LERNEJO.

Fot. Svacina.

Finjara Ekspozicio de lernantaj laboraĵoj.

El Svislando, ni ricevis pri tiu temo, el nia afabla samideanino F<sup>ino</sup> Schenk, tre interesan leteron kaj fotografaĵojn. « En Svislando, ŝi skribas, la festo tre diversmaniere okazas. En kelkaj lokoj, ĝi nur konsistas el ceremonio en iu preĝejo, kaj el ekskurso farota en la venontaj tagoj; tre ofte, la infanoj mem, precipe en popolaj lernejoj, kolektas la monon necesan por tiuj ekskursoj, organizante teatraĵn kaj muzikajn vesperojn dum la vintro. La kamparaj infanoj tiam tre ofte vizitas urbon de ili nekonatan, dum la urbaj geknaboj pli volonte faras ekskurson en la Alpoj.

Mi konas vilaĝon, kies lerneja estraro, ĉiujare luprenas vaporŝipon; kaj dum unu tuta tago la gelernantoj, kun siaj gepatroj, traveturas la lagon Lemanon.

En Lausanne, la ĉefurbo de la Kantono Vaud, la unua parto de la festo okazas en aprilo; procesie, je l' sono de ĉiuj sonoriloj, la infanoj eniras la preĝejon S<sup>ta</sup> Francisko, kie, antaŭ la parolado de pastro, ili hore kantas. Poste la lernejestro legas malmulte aŭskultatan raportadon pri la pasinta jaro. Sur la tablo, antaŭ li, estas kvar flavaj kovertoj; ĉiu entenas kvardek frankojn, kiujn oni disdonas al kvar geknaboj elirontaj el la lernejo, kaj kies fervoro kaj bona konduto estis rimarkindaj dum iliaj studoj. Dua horo finas la ceremonion.

Sed la, de la infanoj pli amata, dua parto de la festo okazas en julio. Ĝi estas nomata *Fête du Bois*, (Festo de la Arbareto). Le gelernantoj en helaj vestoj zonitaj de rozkolora banderolo, sur kiu estas legeblaj la nomo kaj numero de iliaj klasoj, iras, denove procesie, tra la urbo sub la varmega suno, akompanataj de flagoj kaj de tri muzikistaroj, al arbaro de Sauvabelin. Tie, la soifantegaj promen-

adantoj trovas diversajn trinkaĵojn kaj bulkojn. Ĉiu partoprenanto al la festo ricevas kvar biletojn, kiuj rajtigas lin por kvar rajdoj sur karuselo; neniu maluzas ilin. Poste, oni ludadas, dancadas, pafadas, promenadas laŭ deziro. Kiam vesperigas, la procesio refariĝas kaj reeniras la urbon, kun kantoj, krioj k. c., dum, en ĉiuj anguloj, brulas bengalaj fajroj.

En S<sup>t</sup> Georges, vilaĝeto en monto ĵura, la infanoj ne konas la feston, kiun aliloke ĉiuj lernantoj ŝatas.

Malgrandan plezuron oni tamen faras al ili. Ĉe la fino de la ĉiujara ekzamenado, la lerneja konsilantaro disdonas rekompencojn; tiuj estas samaj por ĉiuj infanoj de sama klaso. La plej aĝaj, kiuj tuj forlasos la lernejon ricevas psalmolibron, — uzatan en la enlandaj preĝejoj, — orumitan, kun siaj ĉefliteroj sur la kovrilo. La ceteraj lernantoj laŭ la klaso al kiu ili apartenas ricevas moneron nepre novan, 1 fr.; 1 fr. 50 aŭ 2 fr.


Ĉar mi havis la grandan plezuron ĉeesti, la lastan jaron, unu el tiuj festoj, mi ankaŭ volas diri la profundan impreson kiun mi, fremdulo, ricevis de ĝi. En la monato julio mi trairis la lagon Lemanon dum belega tago, kiel tiuj, kiujn ni ĝuis kelkajn semajnojn poste, dum la Kongreso, kaj mi rave admiris la pentrindan kadron, kiun neniu el niaj samideanoj, partopreninta la ekskurson al Vevey, forgesos dum sia vivo. Ĉe preskaŭ ĉiuj enŝipiĝejoj, estis tiuj karavanoj da gelernantoj, pri kiuj parolas F<sup>ino</sup> Schenk. La geknaboj, hele vestitaj, portantaj botanikajn kestetojn, ekokupas la tutan antaŭon de mia ŝipo, kaj sidiĝas gaje meze de siaj geparencoj kaj instruistoj, kiujilin akompanas, sur la ambaŭflankajn benkojn. Kaj baldaŭ, kaj de tempo al tempo dum la tuta ŝipirado, la freŝaj infanaj voĉoj de la tuta anaro aŭdiĝas, kantantajn hore tiujn himnojn al naturo, al libereco, kaj al amata patrujo, kiujn fremdulo neniam povas aŭdi nekortuŝate (1).


Daŭranta.

TH. ROUSSEAU.  
TH. RUSO.

(Ĉiuj rajtoj rezervitaj).

(1) Vidu: Pola Antologio de Kabe. En Svisujo.





LA AEROPLANO SANTOS-DUMONT ALPENDIGITA AL LA DIREKTEBLA N° 14.

## La Aerveturado

de MARCEL FINOT (Francujo).

Ni trairas Teron kun rapideco kaj facileco senĉese pli grandaj; niaj ŝipoj trapasas la marojn ĉi-flanke; lastan eltrovon, jam iom komencitan, ni devas fine celi: la aerveturadon. Kia bela revo, alte flugi super la urboj, pli alte ol la nuboj, venki ĉiujn malfacilaĵojn kiuj kunligas nin al la supraĵo!

Tamen se la aerveturado ne provizus alian utilon ol esti rarega plezuro, ĝi ne meritus ke tiom oni laboras, por ĝin plivastigi; sed grandegaj estas jam ĝiaj utiloj. Efektive kelkaj landoj estas, kiujn oni ne ankoraŭ povis viziti, ĉu pro naturaj baroj, ĉu pro resisteco de landanoj: ĵus aerostate oni provis ilin atingi. Sendube multdangeraĵoj estas tiuj vojaĝadoj. Andréo provis tiel atingi Nordan Poluson, sur ordinara aerostato nedirektebla, al kies korbego pendis longa ŝnurego gvidanta, kiu tere treniĝis, kiel apogpunkto, kiam la vojaĝanto provis ĝin deklini el ĝia vojo. Oni memoras ke Andréo, enŝipita la 17<sup>an</sup> de julio 1897 sur *l'Aglo*, sur bordoj sovaĝaj kaj dezertaj de Insulo de Danoj, neniam revenis, kaj la Poluso konservis la sekreton pri lia morto.

Multaj estis la enuoj por la eltrovistoj kiuj provis subteniĝi en aero propramove, ĉu per grandegaj flugiloj similaj je tiuj de birdoj, ĉu aliamaniere. Precipe, dum la lastaj jaroj, multimegaj provoj estis farataj, kiuj multe faciligis la solvon de tiu problemo. Mi intencas tie ĉi paroli pri la plej interesaj kaj la plej gravaj el ili.

### La aerostatoj direkteblaj.

La aerveturistoj devas kontraŭbatali malamikon nevenkeblan, kies koleron ili ne sentime povas

vek: tio estas la vento. Por ke aerostato direktata de motoraparato povu laŭvole trairi, resisti al vento, ne esti fortirita, estas necese ke ĝia rapideco estu pli granda ol tiu de l' vento kiu blovas tra la regionoj kiujn ĝi trairas. Ne parolante pri turneventegoj, kiuj blovas je 30 aŭ 40 metroj ĉiusekunde (t. e. la rapideco de rapidvagonaroj) la rapideco meza de l' vento estas 10 metroj; la tagon, kiam oni trovas motoron kapablan kontraŭbatali ĝin, la problemo jam estos nur ludo.

La unuaj eksperimentistoj kiuj direktis aerostaton estas S<sup>roj</sup> Krebs kaj Renard. La 9<sup>an</sup> de aŭgusto 1884<sup>a</sup>, ili sukcesis plenumi aeran vojaĝon, kaj reveni al la forira loko; la rapideco de l' vento estis 6 metroj.

Poste, dum longa tempo, nenia sukcesa provo. La malsukcesaĵoj de la unuaj aerveturistoj prudentigis iom la aliajn. D<sup>ro</sup> rusa kaj fama aerveturisto Danilewsky elpensis tiun rezonon: se nia korpo estus malpli peza, ĝi pli facile estus direktebla tra aero, ĉar la plej granda parto de la laboro de homo fluganta utilus al la motoro. La aerostato konsistis do el du partoj: aerostato portanta, flugilo direktanta. En 1899, en Ŝarkoff, li sukcesis, dum senventa vetero, flugi tra l' aero.

La saman jaron, la amerikano Carl Myers, aldoninte al aerostato velocipeton, trairis ĝis 400 metrojn alten, supren kaj malsupren-irante kaj turniĝante facilege.

La germana inĝeniero Schwartz, per aerostato longa je 14 metroj kaj sama kiel tiu de Danilewsky, sublevis motoron kiu agis sur tri helikoj, en Tem-




pelhof apud Berlin (vento 8<sup>m</sup>). Alveninte ĝis 180 metroj alte, ĝi portis lin kelkajn momentojn kaj refalis teren, kie ĝi rompĝis.

Ne multe pli sukcesaj estis eksperimentoj de S<sup>ro</sup> Grafo Zeppelin: aerostato, movigita de 4 helikoj, kaj kies kadro estis alumina, devis flugi super lago de Konstanco: multaj malsukcesajoj ne malkuraĝigis la scienculon, kiu daŭrigas siajn provojn.

La Brazilo Santos-Dumont komencis en Francujo siajn eksperimentojn en 1898. Lia unua sukcesego okazis la 29<sup>an</sup> okt. 1901. Lia aerostato estis ŝpiniloforma; korbego alligita al ĝi per ŝnuregoj enhavis la aparaton, konsistantan el ŝraŭbo kun paletroj, movita de petrolmotoro de 16 H. P. Per tiu ĉi aerostato, li eliris el parko de l' Aero-Club, kaj tien revenis, turninte ĉirkaŭ la Eiffelturo, tralluginte 12 km. dum 29' 3".

De tiu tempo, ĉian jaron oni parolis pri liaj novaj sukcesoj: nune li konstruas sian 15<sup>an</sup> aparaton, ankoraŭ pli gravan ol la aliaj.

Franco S<sup>ro</sup> Lebaudy provis, en 1905, plenumi grandan vojaĝon per aerostato iom simila je tiu de Santos-Dumont; ĝi konsistis el cigarego maldikigita apud la du pintoj, longa je 57 metroj kaj flavkolora (la *Flavaĵo*); motoro de 40 H. P. movigis du helikojn flankajn, 2<sup>m</sup>80 diametre, turniĝantajn 1000 fojojn ĉi minute. Li eliris el Chalais-Meudon la 3<sup>an</sup> de julio 1905<sup>a</sup>, laŭ ministra ordono, atingis Meaux, poste Chalons; sed terura ventego rompĝis la ŝnuralligojn, la aerostato freneze forflugis kaj fine rompĝis teren. S<sup>ro</sup> Lebaudy konstruis duan aerostaton *Patrie* (Patrujo), longa je 62 metroj (koste 1/2 miliono da fr.); ĝia rapideco estas 45 kmj ĉiuhore, t. e. 12<sup>m</sup>50 ĉiusekunde; ĝi povos venki ĉiujn ventojn, escepte la ventegon; ĝi povos flugi dum 10 horoj kaj trairi 450 kmj; la kugloj ne povas atingi la korbeg-



LA DIREKTEBLA « PATRIE » (NOV. 1906).

on kaj la truoj, kiujn ili faras en la koverton, estos senefikaj; ĝi povas supreniri ĝis 1000 metroj alte, la kuglegoj de kanonoj ne atingos ĝin: ĝi estas militaerostato. Esperu tamen, ke neniam oni uzos ĝin por tiu celo!


Ni citu ankoraŭ la aerostaton: *Urbo Parizo* konstruita laŭ montroj kaj aerostato de S<sup>ro</sup> Renard; malantaŭe estas aldonitaj 8 cilindroj plenaj je hidrogeno kaj duope kruce kunligitaj; tiu dispono faciligas la movadon kaj haltigon tra aero. Ĝiaj unuaj provoj, bonegaj (nov. 1906) estis interrompigitaj pro rompo de motoro, kaj ĵus sukcese rekomencis (febr. 1907).

### La aeroplanoj.

Imitado de flugado de birdo estas ideo tiel natura, ke ĝi devis tenti la homojn antaŭ l' ideo de konstruado de aerostato: efektive oni parolis pri aeroplanistoj antaŭ ol paroli pri aerostatistoj. Ĉu, laŭ antikvaj legendoj, Dedalo ne foriris palacon de Minos, alliginte al si flugilojn per vasko, kaj traflugante super maro Egeo? Leonardo de Vinci, pentristo fama, multe studis la flugadon de birdoj kaj verkis gravan libron pri la mehanikaj flugiloj. Jam antaŭ unu centjaro kelkaj serĉemuloj provis konstrui tiajn aparatojn. Sed la unuajn sciencajn eksperimentojn ni ŝuldas al Lilienthal (1895). Lia aparato konsistis



LA AEROPLANO ELIRANTA EL SIA EJO.



LA PROVOJ DE AEROPLANO SUPER LA KAMPARO.



SANTOS-DUMONT SUR SIA AEROPLANO.



SANTOS-DUMONT EN SIA LABORĈAMBRO.

el du flugiloj longaj je 7 m., kiujn li mem movigis, kaj malantaŭe direktilo, kiu anstataŭis voston; li provis, se ne alten flugi kiel aglo aŭ alaŭdo, almenaŭ dolĉe kaj sendanĝere malsupreniri el monteto teren apud Berlin, kaj trairi dum 300 metroj. Li tion sukcesis, ĝis kiam malbona movo renversis la aparaton kaj mortigis la malfeliĉulon (9 aŭg. 1896).

Ni citu la aparaton de l' Amerikano Maxim (1894) longan je 32 m, larĝan je 38, altan je 11, grandegan birdon kun kvin duoj da flugiloj; de S<sup>ro</sup> Ader (1898), grandegan vesperton longan je 15 metroj, kies flugiloj laŭvole etendiĝas kaj maletendiĝas; de Amerikanoj, la fratoj Wright, kiuj certigas ke ili longatempe flugis.

Sed la plej gravaj eksperimentoj estas tiuj de Santos-Dumont. Malgraŭ siaj laboroj pri aerostatoj, li tentis venkon de l' aero per fluganta maŝino. La S. D. n<sup>o</sup> 14<sup>bis</sup> konsistas el du ĉeloj similaj je flugludilo; bambu kaj kanoj kun silko ŝtreĉita formas du flugilojn V-formajn. Ili estas fiksitaj al trabo por-

tanta apud antaŭa pinto, direktilon konsistantan el similaj ĉeloj, kaj moveblaj ĉiuflanke; apud malantaŭa pinto, motoro de 24 H. P. La aparaton li alligis unue al la korbego de sia direktebla S. D. n<sup>o</sup> 14, kaj tiel li provis flugi; fine la 13 nov. 1906, li sukcesis subleviĝi senpere kaj trairi en aero 220 metrojn dum 21 sekundoj. t. e. 37 kmj hore.

Li nune konstruas novan pli grandan aparaton, movigotan de motoro de 100 H. P. kaj pezan nur je 1 kgm. po 1 H. P.

Pli multaj serĉuloj konstruas nune aparatojn pli malpli similajn, en Kopenhago, Monako, en Anglujo, k. t. p. Ilia superemo estas ekscitita per sciigo pri du konkursoj, en 1908, de maŝinaj aeraj: la kurado Parizo-Londonon, por ĉiuj aerostatoj, kaj London-Manŝester'on nur por aeroplanoj; la premio por ĉiu konkurso estos 250.000 frankoj.

Bonan ŝancon al la konstruistoj!

P<sup>ro</sup> MARCEL FINOT. (Fraucujo).


### Morto de S<sup>ro</sup> Moissan.

Post la morto de Curie, eltrovinto de radjo, dispremita de ŝarĝveturilo, ni devas bedaŭri tiun de S<sup>ro</sup> Moissan, post ĥirurgia kuracado de apendicito, la 20<sup>an</sup> feb. 1907.

Li estis precipe fama pro eltrovo de sia elektra forno, kiu ebligis al li la unuan fabrikadon de kristaloj, mikroskopaj sendube, de diamanto. Lia nomo estos ĉiam fama, tial ke li povis eniĝi en unu sekreto de la Naturo, kaj elirigi el la fajrero produktita inter du karberoj la plej multekostan el la kristaloj. Sed la scienculoj ŝatas ankoraŭ plie liajn belajn elserĉadojn pri fluoro. Li povis disigi tiun nevenkeblan metaloidon, kiun oni ne povis malliberigi en kia ajn ujo, ĉar ĝi mordetas la vitrojn la plej fortikajn, porcelanojn, ĉiujn metalojn, eĉ oron; li sukcesis konservi ĝin puran en platina ujo.

Liaj laboroj estas rekompencitaj de la internacia premio Nobel, kiun li ricevis en Stockolm, en nov. 1906. Li mortis en la forto de l' matureco, aĝa je 54 jaroj.

MARCEL FINOT.



MOISSAN EN LIA LABOREJO.

Ĉar li sendube malesperis verki ion ekivalentan je « Gvilhelmo Tell » kiu estis prezentata en la jaro 1829, Rossini subite ĉesis verki por la teatro kaj resignaciis, kiel la franca poeto Racine, silenti dekdu jarojn (1). Tiu lazaron'o nur forlasis la ĉarmojn de la ripozado por eldoni, ĉiam kiel la pridirita poeto, du religiajn verkojn, k. e. « Meso solena » kaj « Stabat Mater », kiuj, eĉ ne komencante novan manieron de l' majstro, ankoraŭ indaj estas je la gloro kiun li ŝuldis al la dramaj verkoj de sia juneco kaj maturaĝo. En tiuj ambaŭ verkoj ni retrovas la povan inspiron de iaj partoj de Gvilhelmo Tell aŭ Moizo. Oni riproĉis al « Stabat » ĝian teatrecon: ja tiu verko kun siaj soli kaj kadenzoj elsaltigantaj ĝis la supro de la voĉa skalo kaj siaj akompanaj formuloj tiel interesaj, nenion havas komunan je la kanto laŭ Palestrina, kaj tiom estas malsimila je la severa ordo de la « Bach » aj oratorioj. La beleta dueto « quis est homo », nepre itala tiu ĉi, videble estas verkita por reliefigi du ĉefkantistinojn, kaj malfacile oni imagas Patrion Doloran elspiranta siajn plendojn per tiaj akcentoj kaj vokalbroadadoj; sed, apartiginte tiun pecon, malgraŭ ĝia senlima ĉarmo, ĉu oni povas diri, pri ceteraj « numeroj », la horoj, la voĉkunigoj, ke ili ne estas religiaj, tial ke ili stile diferencas je la « Meso de Papo Marcel »? sed alie ja ili estas tiaj.

Al kiu numero ni donos la palmon, el tiu partituro tiel diverskolora, kie superfluas la melodio, kaj kies formoj akompanaj estas tiel novaj kaj pentrindaj? La enkonduka horo, kortuŝanta plendado en takto 6/8, kun siaj kontraŭtempoj ploregsimilaj, komenciĝas per frazo de violonĉelo, sekvata de melodio en G mol, kiu poste translokita en Bes dur, akompanos ok taktojn da kanto tenora; tiu horo finiĝas per sekvo grade malaltiganta el septimaj akordoj. Tia enkonduko similas ian el tiuj majstraj antaŭparoloj kiuj valoras tutan verkon, majestan pordegon de belega konstruaĵo.

La dua N° (Cujus animam) estas solo tenora, dolĉa kantileno taktigita de arpeĝoj kaj semita je liberkadencoj tre brilaj kaj elegantaj. Oni rimarku lertan uzon de grada sekvo dank' al kiu nia majstro malproksimiĝas de la komenca tono As ĝis la tono A por reatingi la unuan tiel ĉarmege kun la vortoj *nati p̄anas inlyti*.

En la dueto N° 3 (quis est homo) Rossini pli ol aliloke cedas al la kanto kiun oni nomas itala; estas neeble pli lerte kunedzigi du virinajn voĉojn, briliginte ilin malkune.

La N° 4 (Pro peccatis) estas ario por basa voĉo, kiun piaj koncertoj ofte enskribis en siajn programojn.

Ĉarma horo senakompana poste alvenas Kia akcenta dolĉegeco! Kia harmonia koloro en la mallonga frazo kvarvoĉa, kiu interrompas la deklamaĵon de la solkantanta baso! poste kia ĉarmo en tiuj kvar 6/8 aj taktoj (in amando Christum Deum), kiuj duloke rompas la taktaron po kvar kvaronoj!

La N° 6 estas kvarvoĉa kanto, kiu pro la modera irado kaj la unuforma akompano povas iom longa ŝajni; sed kiel agrablaj estas la melodio kaj la dialogo de la partoj!

Post la N° 7, bela kavateneno por soprano, kiun akompanas klarneto sola, ni ricevas « Inflammatus »,

laŭ mi la ĉefgemo de la partituro. Ĝi estas solo de soprano piege inspirita, kiun ĉe la fino ekakompanas horo duonlaŭta. La kvar tempoj de ĉiu takto daŭre estas plenigitaj de kvar grupoj po ses duonhokumitaj notoj, kun apogiaturaj alterne supera kaj malsupera, kies persista akompanado neforges-eble impresas la animon. La melodio, ja, tre simpla, komenciĝas en la tono C mol, daŭras en la tono rilata E, por finiĝi en la tono C dur, kaj antaŭ ĉiu novtona frazo audiĝas ok taktoj de la horo, fortikege kantataj, kun la vortoj *In die iudicii*, tiel instiga kiel simpla. La aranĝo de tiu peco, kiu tiel grandege impresas, estas, laŭ mi, simila je tiu de la preĝo de Moizo. Gustatempe Rossini memoris la impreson, kiun ĝi estas iam elfarinta en la teatro. La plej fortaj dramaj akcentoj de li esprimitaj en operoj reaperas en tiu « Inflammatus », ekzemple, la fina *crescendo* sur la vortoj *confoveri gratiā*, kun tri akordoj malgrand-septimaj malaltigantaj duontone al la akordo kvarta-seksta de la kadenco definitiva. Eble ja teatra, pliĝuste drama, sed kiom impresa ĝi estas! kaj daŭras la persista akompanado per apogiaturaj, kiuj nur antaŭ la lasta takto nin lasas.

Post la N° 9, kvareto senakompana, alvenas la konkluda peco, fugo tre detala, kiun Rossini, ne amema al tiu skolastika formo, nur kiel pruvon de sia kapableco entreprenis; ĝi lertege finiĝas per ripeto de l' enkonduka frazo laŭ G mol.

Tia estas tiu mirinda partituro, kie ĉiuj gustoj ricevas kontentecon; neniam peco, kiu ne estas kortuŝanta kaj ankaŭ signita de la majstra ungo. Sen ia dubo Virgulino, kiun Litanioj nomas la pordo de l' ĉielo, ne havis sendankecon al la kantinto tiel inspiritan de siaj patrinaj doloroj kaj, malgraŭ liaj nesanktaj turtkantoj, ricevigis la paradizajn ĝojadojn al la kreinto de Rozino, de Matildo.... kaj de Bazilo.

E. BACQUET.



### Muzikaj verkoj.

Apenaŭ naskita, Esperanto, dank'al la metraj principoj de Zamenhof, tuj produktis liran verkaron, kiu alvokis Muzikon. Tiel naskiĝis la *Espero*, de F. de Ménéil, kiu vivados por nia *Marseillaise*. Jen ekaperis du interesaj unuvoĉaj verkoj tre melodiaj de Sino Guivy: *Himno*, laŭ flamaj strofoj de Dombrowski memorigantaj la konatan preĝon Zamenhof'an, kaj *Birdoj, forflugu*, beleta valso facilokantebla, laŭ poezio de abato G. Gezelle, (2) fama flandra poeto kaj multlingvisto, tradukita de Seynaeve; ambaŭ kun brila akompano por f. p.

E. B.


Aĉeteblaj: Presa Esperantista Societo.

« Kristnasko », la nova muzika verko de nia kunlaboranto L. Rigoir, laŭ la bela poezio de l' fama franca verkisto Théophile Gautier, esp. de Dr° Philippet (1 fr. 50 c., ĉe l' aŭtoro, L. Rigoir; 20 Rue des Ormes, Charenton, France).

« Flugintaj Revoj », poezio en Esperanto de Grabowski, muziko de Paŭlo Wachs (2 fr. ĉe l' eldonisto, E. Weiller, 21, Rue de Choiseul, Paris, France).

(1) Racine ja verkis « Esther » on, en 1689, petita pri ĝi de Sino de Maintenon, post dekdujara silento; *Athalie* aperis en 1690.

(2) Abato Gezelle, naskita en Bruges, mortinta en dec. 1899, estas tre ŝatata en Belgujo kiel poeto kaj klerulo. Li konis 13 lingvojn.



RIO DE JANEIRO — MARBORDA ALEO.  
Belega promenejo konstruita en la daŭro de du jaroj.

## Urbo renaskiĝanta. Rio-de-Janeiro.

Verkita de EVERARDO BACKHEUSER, (Brazilujo).

Ĉu estas ebla la renaskiĝo de io ajn? Ĉu urbo povas renaskiĝi, aŭ almenaŭ rejuniĝi kiel Faŭsto de la germana fabelo?

Rio-de-Janeiro, ĉefurbo de Brazilujo, pruvas ke urbo, kiu antaŭe estis malbela, malpura, nelogebla, povas iĝi bela, pura kaj loĝinda. Hierau, en Rio, vivis nur ĝiaj loĝantoj kaj neniu plu. Hodiaŭ Rio estas vizitata de turistoj, kapitalistoj kaj de ĉiuj ŝipveturantoj en sudamerikaj akvoj.

Antaŭ kvar jaroj ĉiuj vojaĝantoj timis malsupreniri el siaj vaporŝipoj, kiam ili alvenis la belegan golfeton de Rio: ili timis la varmon, la mallarĝajn stratojn, la polveron mortigan, kaj precipe la *flavan febron*, malbelegan fantomon. La golfeto, ĝiaj insuletoj, ĝiaj montetoj estis mirindaj, sed la flava febro, la varmo kaj la polveraro instigis la vizitantojn malproksimiĝi sin de la urbo.

Nun en Rio, ja, ne ekzistas la timata flava febro, malsano, kiun la tuta Homaro prave timas. Nun en Rio la stratoj ne estas mallarĝaj; nun la vetero estas kompreneble varma, ĉar Rio sidas ĉe la tropikoj, sed la varmeco estas dolĉigita de konstanta venteto, kiu blovas la urbon tra la larĝaj aleoj, kiuj anstataŭas la malbelajn stratojn.

Sendube la legantoj ne bone komprenas tiujn ĉi vortojn. Sajnas nekredible, ke urbo rejuniĝas post multaj jaroj vivadaj. Ĉiuj, kiuj antaŭe konis Rio'n komprenos mian priskribon.

La grandaj laboroj, kiuj


igis Rio'n bela kaj ĉarma urbo, estis farataj de du homoj, de du eminentaj homoj, dum la rapida pasado de *kvar jaroj*: S<sup>roj</sup> Rodrigues Alves kaj Pereira Passas, la unua, Prezidanto de l' Respubliko, kaj la dua, regnestro de la urbo. Ili ambaŭ senlace laboradis kaj ili plene ŝanĝis la brazilan ĉefurbon.

Nun neniu timas, nek povas timi, la malsanigecon de Rio-de-Janeiro (Rio-de-Janeiro), ĉar per la senintermanka batalado kontraŭ la kuloj, la ofico de l' Publika saneco atingis la definitivan malaperon de la flava febro; per la detruado de malnovaj domoj, la urba regnestro konstruis novajn stratojn aŭ plilarĝigis aliajn.

Tiuj laboroj por sanigi ĝin tiel bone sukcesis, ke la Prezidanto de U. S. A., S<sup>ro</sup> Roosevelt, elektis Rio'n, por ke en ĝi kunvenu la 3<sup>a</sup> Kongreso Panamerika. Eble antaŭ tri jaroj, tio ne estus okazinta pro ĝia malbona famo. Tamen nune iu ajn

timo, eĉ la plej malgranda, estas forigita kaj la delegitoj de l' amerikaj nacioj kunvenis inter festoj kaj festenoj. Brazilujo konstruis specialan palacon, kiu staras belega proksime de la marbordo, vidata de la maro kaj de la tuta urbo dank' al sia alto, al la montetoj de la urbo, kaj al la du longaj aleoj — Aleo Centra kaj Aleo Marborda — ambaŭ ĵus konstruitaj, kiuj alkoniras la palacon.

Kion decidis la Kongreso Panamerika? Tion, kion decidis la kongresoj: dezirojn, simplajn dezirojn, sed dezirojn, kiuj efektiviĝos se la registaroj



PALACO MONROE  
kie kunvenis la delegitoj de l' Panamerika kongreso, en Julio 1906.

de la respublikoj amerikaj volos efektiviĝi ilin. Ĝiaj voĉdonoj estis por la paco, kio montras, ke Ameriko ne volas la armatan pacon, kiu malfaciligas la vivon de l' laboristoj, kaj eĉ de l' riĉuloj, en Eŭropo.

Ni esperu ke la Paco ekregos sur tero! Kaj ke Ameriko estu la antaŭiranta!

Kiam kunvenis la delegitoj, S<sup>ro</sup> Elihu Root, (Rut) nordamerika ministro de fremdaferoj, venis Brazilujon kaj vizitis la kongreson. La Braziloj plezurege ricevis la honorindan viziton de S<sup>ro</sup> Root; kaj, dum lia ĉeestado en Rio, la publikaj povoj, studentoj, kaj popolo faris senintermanke grandajn festojn.

Por rememorigi ĉiam la solenan kunvenon de l' Kongreso Panamerika kaj la neforgeseblan viziton de S<sup>ro</sup> Root, Brazilujo donis al la Palaco la nomon de l' fama mortinta prezidinto de Unuigitaj Ŝtatoj — *Monroe*.

Ĉar ankaŭ la esperantismo fortege disvastiĝadas ĉi tie, eble baldaŭ la tuta homaro venos Rio'n pro baldaŭa (4<sup>a</sup> au 5<sup>a</sup>?) kongreso de nia lingvo. Por ni, kiuj estas *pacaj batalantoj* (ĉiu Brazilo estas pacamikema), tiu okazo estos gravega, kaj ni ĝin tre deziras. Kiam tiu deziro efektiviĝos, la esperantistaro vidos kiel bela estas la *vizitĉambro* de Sud-Ameriko — Rio de Janeiro.

EVERARDO BACKHEUSER (EVERARDO BAKHOJZER).  
Inĝeniero kaj unua Prezidanto de  
l' Brazila Klubo Esperanto.  
*Escola Polytechnica, Rio de Janeiro.*




### Pri la Amerikana vivo.

La severa konkurso komerca kiu ekzistas en Ameriko, estas la kaŭzo de multe da novaj elpensajtoj. Proverbo diras: neceseco estas la patrino de elpenso.



RIO DE JANEIRO — LA NOVA URBO.

*Centra Aleo, konstruita dum du jaroj, kaj traŭnta la urbon.*



RIO DE JANEIRO — LA MALNOVA URBO

*plena je mallarĝaj stratoj, antaŭ la administracio de S<sup>ro</sup> Passas.*

Ĉiu kiu volas prosperegi, devas esti ne nur tre diligenta, sed ankaŭ tre lerta, elpensante novajn metodojn, kiuj forprenos komercon de liaj konkurantoj. Ekzemple: riĉa vendanto en tiu ĉi urbo, volante plimultiĝi siajn vendojn, enmetis en sian magazanon, kelkajn seriojn da moveblaj ŝtuparoj, kiuj, supreniradante kaj malsupreniradante, povas interporti la aĉetantojn inter la diversaj etaĝoj. Tiaj ŝtuparoj, kredeble, povas portadi pli da personoj ol homleviloj, kiujn ankaŭ, tamen, la sama magazeno posedas. Ankaŭ troviĝas tie, ordinaraj (fiksitaj) ŝtuparoj; tial, ĉiuj povus forkuri el la domo se ĝi ekbrulus. Dum iom da tagoj antaŭ Kristnasko (kiam la vendoj fariĝis la plej grandaj) la vendanto igis la moveblajn ŝtuparojn movi tiel ke ili portadis personojn nur supren; tial, ili lasis pli da aĉetantoj eniri en lian magazanon je la samtempo. Tiel ĉi, la vendanto trege plimultiĝis siajn vendojn, ne ja farante malbonon al iu, krom, eble, al siaj konkurantoj.

Dum la amerikana vivo komerca, la plej grava afero el ĉiuj ŝajnas esti, savi tempon. Ĉio devas esti farata, kiel eble plej rapide, kaj ĉiu vendanto volas agi pli baldaŭe ol iu el siaj konkurantoj. Tiuj ĉi cirkonstancoj kaŭzadas grandan aperadon de rapideco, kaj eĉ la aĉetantoj, kaptigitaj per la sama spirito, promenantaj sur la stratoj, iras kaj venas, tre rapide. Historiskribanto estas dirinta: « la popoloj apenaŭ prenas tempon manĝi, kaj ilia irado sur la strato estas multe pli rapida ol komuna promeno. » En tiujn ĉi vortojn, iome trograndigitajn, la historiskribanto enmetis multe da vero. Tamen, Amerikanoj neniam formetas la memoron de siaj ultimataj celoj, kiujn, kontraŭe, ili penas ĉiel honeste atingi, kiel eble plej baldaŭ. Tia vivo ja eltiras ĉiun kaŝitan energieron

homan, kaj kaŭzas, efektive, aktivecon komercan, kiu estas certe la ĉefa klarigo de la multaj elpensajtoj amerikanaj. Oni konfesas, tamen, ke Ameriko devas danki tre kore la alilandajn enmigrintojn, kies fortegeco kaj kies persista seriozeco helpas trege je la tasko vastigi la fabrikadon kaj la komercon ĉe la Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj. Tial, estas tiu ĉi unuigeo, tiu ĉi frateco de la homoj, kiu atingas ĉion, kaj kiu meritas ĉiun laŭdon.

*Originale verkita de*

EUGENE FAIRFIELD MC PIKE.

### La Sinjoro kiu sciis 70 lingvojn

Jérémie Curi (Ĵeremi Kuri) estis la nomo de tiu ĉi mirindulo Li ĵus mortis en Bristol (Unuigitaj Ŝtatoj) lerninte 70 antikvajn aŭ nunajn lingvojn. Precipe li estis mondfama pro la konado de Mongollandaj lingvoj. Sed la ĵurnaloj ne sciigis al ni ĉu li uzis kelkfoje Esperanton. Rimarkigu ni, ke, sur la terglobo, oni parolas almenaŭ 3000 lingvojn aŭ gravajn dialektojn.

B.



Kopirajto.

BULGARAJ GEJUNULOJ  
Alek. Georgiev.

Fot. A. Georgiev.

## La bulgara vilaĝa edzigo.

Originale verkita de LEŬTENANTO SILVESTRIEV, el Ŝumen (Bulgarujo).

« En ĉiu vilaĝo — leĝo », diras la bulgara proverbo. Same estas pri la edziĝoj — en ĉiu vilaĝo ili havas ion apartan. Ni ĉi tie kombinos ĉiujn kutimojn de edziĝo en Bulgarujo kaj eltiros la komunajn, tiel ke ni ne priskribos kiamaniere iĝas la edziĝo en tiu aŭ alia vilaĝo, sed kiel iĝas la « Bulgara vilaĝa edziĝo ».

En la Bulgara edziĝo ni videtas kvar momentojn aŭ periodojn :

1) Antaŭa preparolo aŭ malgranda fianĉiĝo (odŭmvane aŭ malak godej), 2) Granda fianĉiĝo (goljem godej), 3) Hako (interŝanĝo) de ringoj (sjeĉene (mjenjāvane) prsten) kaj 4) Edziĝo (svātba).

### I. — Malgranda fianĉiĝo.

Nenie en Bulgarujo oni sendas svatanton (posrjednik) de la knabina flanko, sed ĉiam flanke de l' fraŭlo, kiu en diversaj lokoj estas nomata : svatovnik, jenihlar, prjedumnik aŭ snobnik. Ĝi estas nerompebla leĝo.

Kiam iu fraŭlo volas preni iun knabinon kiel edzinon, lia familio sendas en la knabinan hejmon « svatovnik » (svatanton) aŭ « svatovnica » (svatant-inon) (plej ofte estas viro ne virino). Al la svatanto oni komisiis iri interkonsenti kun la gepatroj aŭ gezorgantoj de l' knabino pri la fianĉiĝo. Por tio estas elsendata unu el la plej proksimaj parencoj aŭ amikoj de l' fraŭlo. En tia okazo la sendito aŭ senditino devas sekretigi sian mision, dum ĝi ne ricevas kian ajn finon. Tiel same konservas la sekreton la knabinaj hejmanoj, se ili rifuzas la fraŭlon.

La farado de l' fianĉiĝo kutime okazas ĉe la sekvanta interparolo.

La hejmanoj de l' fraŭlo antaŭe alvokas en sian hejmon la svatanton.

La fraŭlpatro al la svatanto : Ni vin alvokis kiel nian svatanton por svati nian filon (lia nomo) kun (la nomo de l' knabino), filino de (la nomo de l' knabinpatro).

Salutu ilin anstataŭ ni kaj diru, ke ni vin sendis peti pri la knabino por nia fraŭlo ; ankaŭ diru, ke ni estas multe dankemaj al ili, kaj volas eksvatiĝi.

Post ĉi tiu buŝa komisio, kio okazas kutime matene antaŭ krepusko, la estonta bopatro kaj la svatanto sin regalas per brando por bona prospero de l'afero, kaj post tio la svatanto ekiras en knabinhejmon.

Kiam li alvenas knabinhejmen, la svatanto kun rida vizaĝo eniras en la domon, kie oni lin invitas sidiĝi.

Ni devas diri, ke en la domo vilaĝa, kie estas edzinigota knabino, oni frue el lito leviĝas kaj kutime kun gajaj vizaĝoj akceptas la vizitantojn, invitante ilin sidiĝi ĉe honoran lokon — apud la kamento.

La svatanto por montri sian mision prenas la pinĉilon kaj ekmiksas la fajron. La knabinhejmanoj ekvidinte, ke li miksas la fajron, konjektas kia estas la afero. La patro ordonas, ke oni alportu brandon kaj protrinkan manĝetaĵon. Dum oni tion alportas, ili ekligas diversajn interparolojn, sed la svatanto ĉiam mikscadas la fajrajn karbojn.

Alportinte la manĝaĵetojn, oni proponas al la svatanto manĝeti kaj trinki. Li proksimiĝas, sed rifuzas trinki, dirante :

Mi venis por sankta laboro ; saluton al vi mi alportas de... (la nomo de l' fraŭlpatro) kaj oni komisiis al mi diri, ke ili volas kun vi ekriati. Ili multe

kontentaj pri vi estas, kaj ili ĝojos, se vi efektivigos, kion ili deziras.

La knabinpatro: Se estas feliĉo, ĝi iĝos. Nu, bonvolu nun trinki.

La svatanto ree ne volas trinki kaj diras: Oni min sendis peti pri via filino (ŝia nomo) por (lia nomo), tiel ke mi eksvatiĝu.

La knabinpatro: Se estas feliĉo, ĝi iĝos. Ni demandos la knabinon por scii, ĉu ŝi volas. Nu, bonvolu nun; — trinketu.

La svatanto, kontentigita per tia jesa respondo ektrinkas, esprimante bondezirojn pri la komencita afero. Same faras ankaŭ la hejmanoj. Kiam deiras la svatanto, ili alsendas « multan sanon » al ĉiuj familianoj de l' fraŭlo.

La morgaŭan tagon la hejmanoj de l' fraŭlo donas al la svatanto florfaskon, al kiu estas alligita la fraŭla ringo, kaj lin elsendas knabinhejmen ĝin interŝanĝi kun tiu de l' knabino.

Post lia alveno knabinhejmen, la hejmanoj lin akceptas kaj proponas sidiĝi la honoran lokon. Jus sidiĝinte li diras:

— He, mi venis ree por la hieraŭa afero.

La knabinpatro: Bone, sed mi devas demandi ankaŭ la knabinon, por ekscii kion ŝi pensas.

Tiam oni alvokas la knabinon kaj ŝin trifoje demandas, ĉu ŝi konsentas edziniĝi kun tia fraŭlo. Hontema, ŝi respondas. Tiam ŝi kisas la manon de sia patro kaj de la svatanto (kompreneble ĉe jesa respondo; se estas rifuzo ĝi okazis ĉe la unua veno de l' svatanto).

La svatanto elmetas kaj donas al la knabino la florfaskon kun la fraŭla ringo. La knabino ĝin prenas kaj siaflanke al li donas alian kun sia ringo kaj almetas ankaŭ: ĉemizon, ŝtrumpojn aŭ aliaĵon por la fraŭlo kaj tukon por la svatanto. Oni regalas la svatanton, kaj ĉe la manĝotablo servas la knabino mem. La svatanto iras fraŭlhejmen, portas la fraŭlinan ringon. Tie li ree estas regalata kaj ricevas donacojn. Ĝis tiam la farito estas nomata malgranda fianĉiĝo (malak godej).

## II. — Granda fianĉiĝo (goljem godej).

Unu-du semajnojn post la malgranda fianĉiĝo iĝas la granda fianĉiĝo, pli festena. Kaj la du familioj klopodas bone servi al sia parenkaro ĉe la fianĉiĝo.

Vespere eliras la gepatroj, kaj la proksimaj parencoj (ĉiuj edzigitaj) de l' fraŭlo. Ilin antaŭkondukas knabo (estonta honora servanto de l' fraŭlo — « dever ») kun florfasko ornamita per moneroj. Kiam ili alvenas knabinhejmen, la

du patroj ĉirkaŭprenas unu la alian, kaj reciproke kisas la manon. La florfasko alportita de l' hejmanoj de l' fraŭlo estas metata sur ŝeĝon kovritan per blanka tuko, apud alian faritan de knabinhejmanoj. La fraŭlpatro prenas sian florfaskon kaj ĝin donas al la knabino dum li kisas ŝian manon, kaj la knabino donas al li sian florfaskon, kiun ŝi alsendas al la fraŭlo. Post tio oni regalas. Elirante, la hejmanoj de l' fraŭlo donacas monon al la knabino. Ili foriras ornamitaj per florfaskoj donitaj de l' knabino.

## III. — La interŝanĝo de ringoj — la diskutado pri la prezo.

La hako (interŝanĝo) de la ringoj okazas unu semajnon antaŭ la edziĝo, aŭ ĉe l' fianĉiĝo mem.

La du familioj interkonsentas pri la tago, kiam diskutadiĝos la prezo de l' « mskata » (la mulo, tio estas, ke oni similigas la knabinon al mulo, vendota al la hejmanoj de l' fraŭlo).

Fraŭlflanke, du viroj kaj du virinoj iras knabinhejmen. Ili kunportas kutime vinon kaj brandon. Alveninte ili sidiĝas ĉe la jam preparita manĝotablo.

Nun komencas la vendado. Hejmanoj de l' fraŭlo aperas kiel aĉetantoj, hejmanoj de la knabino kiel vendantoj, kaj okazas la jena dialogo:

— Via mulo plaĉis al ni, kiom vi volas ĝin vendi?

— Nek multon, nek malmulton ni prenos de vi — 500 groŝojn (ordinare ĉiam tiom) kaj (laŭ la nombro da hejmanoj de la knabino) paroj da ŝuoj (aŭ pantofloj).

— Ah... Vi multe postulas. Ni donos al vi 300 groŝojn kaj tiom da pantofloj kiom vi volas.

— Ne eble — nia mulo estas bona.

— Ja ni scias, ke ĝi estas bona, tial ni donas tiom.

— Fikse, ne eble malpli peti.

— Nu, petu malpli, por ke ni finu la diskutadon.

— Nu, ni plimalgrandigos la prezon, tamen vi donu pli multe.

— Nu, ankoraŭ 50 groŝojn, ni donas 350 groŝojn.

Post la fino de l' interkonsentaĵo, unu el la fraŭlaj senditoj ekpafas tra fenestro per pistoletto (kiun li, tiucele, kunportas) por sciigi la fraŭlfamilion, ke ili finis la marĉadadon.

Post tio oni donas monon al la knabino. Ŝi kisas al ĉiuj la manon, kaj komenciĝas la regalado.


(Daŭranta).

Speciale por « Tra la Mondo ».

L<sup>to</sup> SILVESTRIEV,  
Ŝumen (Bulgarujo).



BULGARAJ ĜEFIANĈOJ.



LA APOTEZO DE L' MILITO, DE VERESĈAGIN.

## Veresĉagin.

Kiam niaj rusaj legantoj ricevos tiun numeron, estos proksima la datreveno de l' pereco de Petropavlosk, kiu kunportis en la marfundo la faman pentriston Veresĉagin. Ili legos plezure tiujn liniojn dediĉitajn al tiu grandanimulo, kiu ĉiam penadis — per siaj verkoj — malamigi la kruelecon, kaj la militon de kiu li estis estonta suferulo.

Dum la lasta rusa-japana milito, kune kun la rusa admiralo Makarov sur la kirasa ŝipo Petropavlovsk, pereis unu el la plej eminentaj rusaj pentristoj, Veresĉagin (1842-1904).

La temo de la plimulto el liaj pentraĵoj estas la milito. Sed tiu ĉi artisto, « batalisto » unuavide, efektive estis decida kontraŭulo de l' milito, decida pacifisto. En tiu ĉi rilato liaj pentraĵoj havis tre signifan influon, kaj ne nur en Rusujo, sed ankaŭ en eksterlando. Kaj lia paciĝo montriĝas neduba, se ni atente enrigardas la enhavon de liaj pentraĵoj. En siaj pentraĵoj li montris la militon malpura, abomena, malluma kaj kolosa malbonaĵo.

Jen, por ekzemplo, la enhavo de liaj pentraĵoj.

*Forgesita.* Nuda, senĝoja dezerto. Suno subiris. Meze kuŝas malvivulo. Apud ĝi troviĝas, jam malnecesa, pafilo. Malproksime foriras ĝiaj kolegoj, forgesintaj aŭ ne havintaj tempon ĝin preni kun si. Sed dume, grandamase, flugas al ĝi neinvititaj gastoj: agloj svingadas fortajn flugilojn; korvoj kun krioj ĉirkaŭas ĝin; unu jam sidiĝas sur ĝian bruston kaj estas preta ekkomenci teruran regalon.

*Apoteozo de l' milito.* Grandega amaso da kranioj, kunmetitaj kiel piramido. Sub la pentraĵo — subskribo: « mi dediĉas al ĉiuj almituloj, estintaj, estantaj kaj estontaj. »

Veresĉagin pentris kolosan kvanton da pentraĵoj. Li estas konata ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Ameriko. Lia grandega talento estas neduba. La germana pentristo Menzel, vidinte liajn pentraĵojn, nur skuis la kapon kaj diris: « Jen iu, kiu ĉion povas ». Francaj pentristoj trovis, ke li estas por Rusujo tio sama, kio estas por Francujo Detaillé (Detaj) kaj de Neuville.

La plimulto el la pentristoj kaj kritikistoj de ĉiuj landoj konfesas lin plena je vivo, scianta figurajisto kaj bonega koloristo, konfesas neordinaran verecon de prezentado, simplecon de stilo kaj delikatan artan guston.

Pro liaj sukcesoj en Eŭropo, la Rusa Arta Akademio indigis lin je l' stato de profesoro de pentrarto. Sed jena estis lia respondo: « Sciinte, ke Arta Akademio faris min profesoro, mi, opiniante ĉiujn rangojn kaj distingojn malutilaj por arto, decide ne akceptas tiun ĉi staton. » Jen li estis vera artisto.

N. KABANOV. (Rusujo)



### Monumento Jean Laurès.

Je la okazo de l' kampkultura kaj birdnutrada ekspozicio malfermita en Béziers'o antaŭ kelke da tempo, oni inaŭguraciis la statuan de la glora poeto patosa Jean Laurès — naskiĝinta en Villeneuve-les-Béziers en 1822 — pro kiu rajte fieriĝas la tuta sudo de Francujo. Tiu ĉi statuo estas la faraĵo de l' talenta skulptisto Jacques Villeneuve, naskita ankaŭ de nia bela sudo.

Du el la ekspoziciintoj, S-roj Benoit kaj Cassien, esperantistaj grupanoj, pentrigis sur la antaŭaĵon de l' tendo de sia budo du ravajn kvinpintajn stelojn inter kiuj oni legis: « Oni Esperanton parolas ». Tie ĉi havis la plezuron babiladi kun la altestiminda prezidanto de l' grupo, S-ro de Rey-Pailhade, kaj kelkaj el liaj simpatiaj lernantoj.

JOHANINO FLOURENS.



VERESĈAGIN.



## Giosuè Carducci.

Li naskiĝis, en *Val di Castello*, proksime je *Pietrasanta*, la 27<sup>an</sup> de Julio 1835<sup>a</sup>. — Lia juneco estis tre severa; la jarojn de tia aĝo, kiuj estas tiel ridoplenaj por ĉiuj, li pasigis en daŭra laboro. — Li skribis mem pri si la jenajn vortojn: « Ĝis la 14<sup>a</sup> jaro mi ne havis alian instruiston krom mia patro, kiu nur lernigis al mi la latinan lingvon; sed iom pro sia inklino, iom pro siaj kuracistaj devoj, li lasis al mi multe da libertempo por legi ».

Pro la reformista movado de la 1848aj, lia patro, kulpigita pro partopreno, devis transloĝiĝi el *Val di Castello* al *Firenzo*. Je la dekdua jaro li, junulo, faris la kurson de retoriko ĉe la monaĥoj de la *Piaj Lernejoj*, kaj tie amikiĝis kun Henriko Nenci.

Fininte la studojn ĉe tiuj monaĥoj, li elektis la profesion de la instruado, kaj ekinstruis en la Normala Lernejo. La instruado, kiom multpeza, ne malhelpis liajn inklinojn, kaj la tempon kiu restis libera, krom liaj devoj, li okupis per siaj elamataj studoj kaj per la poezio. « La poeziojn — li mem diris — precipe en tiu tempo mi faris vere por mi ». Tiutempe li estis nomata profesoro ĉe gimnazio de *San-Miniato*, kaj pli poste li venkis la konkurson por katedro en la gimnazio de *Arezzo*, kie li restis ĝis 1859.

En 1860 li sin portis en *Pistoja* kiel instruisto de beletristiko en la Liceo. Terencio Mamiani, en Aŭgusto de tiu jaro, proponis al li la katedron ĉe la Universitato en *Bologna*. Kiel antaŭparolo li legis: « Delle diverse età storiche della letteratura italiana ».

En Bologna por Karduci komenciĝis la tempo de la plej granda laboro por la seriozaj historiaj kaj literaturaj laboroj kaj por la ĉarmoj de la poezio.



GIOSUÈ CARDUCCI.

En 1863 aperis lia verko « Nuove Poezie » kaj en 1877 « Odi barbare » kiuj atingis la trian eldonon en la interspaco de du jaroj. La famon de Karduci haltigis iom *Stecchetti* (*Steketi*) per sia verko « Postuma » kiu dum la sama tempo havis sep eldonojn; sed post kelkaj jaroj Karduci regajnis sian famon. Li skribis en kelkaj gazetoj nome « Croce Iizantina », « Fanfulla della Domenica », « Domenica letteraria », « Domenica del Fracassa » kaj liaj skribaĵoj estis poste kunigitaj de eldonistoj, k'uj publikigis « Confessioni e battaglie », « *Levia* », « *Gravia* », « Giambi ed Epodi », « Eterno femminile regale » « *Conversazioni critiche* », « *Nuove odi barbare* ».

Post tiuj verkoj li eldonigis pli malfrue « *Ceneri e faville* », « *Rime nuove* » kaj « *Terze odi barbare* ».

Lia morto okazis en *Bologna*. Lia enterigo estis solenega. Ĉeestis Duko d'Aosta, lia konkuranto Lorenzo *Stecchetti*, la fama advokato socialista Filippo Turati kaj aliaj rimarkindaj personoj, granda nombro da studentoj kaj amaso da popolo; nur mankis kruco kaj pastro.

Fanatike bruis la italaj ĵurnaloj sanktigante eĉ tion, kio estis malpurajo, sed tion ni ne juĝu; la

postularo ŝatos liajn verkojn laŭmerite.

Pro J. MEZZINI.



### FREDERIKO SOLER.

La 26<sup>an</sup> de Decembro de l' pasinta jaro okazis en Barcelono la solena inaŭguracio de monumento al Frederiko Soler konata en la respubliko de la literaturo sub la nomo de Serafi Pitarra.

Antaŭ lia naskiĝo, antaŭ la apero de lia nomo en la literaturo kataluna, Katalunujo ne havis teatron; oni rimarkis ĉies la bezonon de homo kiu, sentante en sia koro la belecon de la popolaj scenoj, trovu en si mem sufiĉe da fortoj, sufiĉe da kapabloj, sufiĉe da poezio, por transloki la ĉiutagajn scenojn de la ordinara vivado sur la teatran scenejon; tiu homo longe atendita fine venis. Li estis Frederiko Soler; Katalunujo trovis en li la bezonatan homon.

La plej granda gloro de Pitarra estas sendube esti la fondinto de katalunlingva teatro: eble hodiaŭ estas inter la kataluna dramverkistaro aliaj, kiel ekzemple Guimerá (Gimera), kies dramoj havas pli literaturan valoron ol tiuj de Pitarra; sed tio ĉi ne malpliigas la gloron, kiun li havas kiel fondinto. Cetere la Pitarr'aj dramoj restos ĉiam kiel literaturaj juveloj en nia landa literaturo.

Inter la verkoj de li skribitaj ni devas nomi, Sota terra, Sub tero, — La Creu de la Masia, La kruco de l' kampodomo, — Les joyes de la Roser, La juveloj de Roser, — Lo Monjo Negre, La Nigra Monaĥo, — Les eures del Mas, La hederoj de la kampodomo — Batalla de Reines, Batalo de reĝinoj, — kaj aliajn.

La popolo el Barcelono ĉeestis en la inaŭguracia festo de l' monumento; per sia ĝojo li montris la amon, kiun ĝi havas al la fama verkisto.

Katalunujo ŝuldis ion al la fondinto de ĝia teatro; la 26<sup>an</sup> Decembron pasintan, tiu ŝuldo estis pagata

JACINTO BREMÓN Y MASGRAU.

### KARTAĜA FESTEGO.

La Tunisianoj pretigas sin por mensogigi la faman poeton dirintan:

« La Terre maternelle et douce aux anciens Dieux  
Fait à chaque printemps, vainement éloquent,  
Au chapiteau brisé verdir une autre acanthe.

Mais l'homme indifférent au rêve des aïeux  
Écoute sans frémir, du fond des nuits sereines,  
La mer qui se lamente en pleurant les sirènes. »

« La patrino, kaj por la Pradioj kortuŝema, Tero  
» Ĉiuprintempe iĝas, vane elokventa,  
» Ĉe la disrompita kapitelo alian akanton verdigi.

» Sed la homo indiferenta al la revo de l' avoj  
» Sentremete aŭskultas, de la fundo de la kvietaj noktoj,  
» La maron plorantan pro malapero de la sirenoj. »

Oni verdigos alian akanton sur la disrompita kapitelo, ĉar baldaŭ, la duan de aprilo, la terkuŝitaj kolonoj de la antikva Kartaĝo estos ĉirkaŭataj de vivo, de vivantoj kiel pratempe.

La eĥoj de la punikaj montoj resonos per kantoj, versoj, speciale verkitaj de famaj poetoj: Sinjorino Delarue-Mardrus kaj Sinjoro Grandmougin. La ĉeestantoj vidos la lokojn antaŭtempajn de la homaro denove iĝi vivantaj. Oni voĉos ne « delenda » sed renaskiĝu Kartaĝo!

C. COMBET.  
Prof. ĉe la liceo de Tunis.

Nun la festoj okazis plensukcese kaj oni povas esperi, ke ili helpos por la konservado de l' Kartaĝaj ruinoj, al kiuj estas alligitaj tiom da heroaj memoroj.

En la franca armeo.

La movado ĉiam progresas. S<sup>ro</sup> de Beaufront vizitis la Ministron de l' Militaĵoj, kun Sinjoro Cornet, deputito, aŭtoro de l' leĝa projekto pri oficiala instruado de Esperanto en la lernejoj, kaj de nia konata kunbatalanto, leŭt<sup>o</sup> Bayol. Pri tio kelkaj amikoj miris, ke kapitano Capé, la vera enkondukinto de Esperanto en la armeon, kies enketo farita post la Ĥina internacia milito estas ankoraŭ utiligata de ĉiuj parolantaj pri Esperanto kaj armeo, kiu varbis la ĉefajn generalojn ĉiam citatajn de la samaj, kiu nun loĝas apud Parizo, ne akompanis S<sup>ro</sup> de Beaufront.

La miro ŝajnas sufiĉe justa, sed la lasta nur povus konigi siajn motivojn.

Kelkaj gazetoj anoncas, ke baldaŭ estos permesite fari kursojn en la kazernoj. Estas t<sup>er</sup>ceraro, kapabla havigi oficirajn francajn dezirantajn fari tiajn kursojn: La 16<sup>ma</sup> de februaro 1905, ministra cirkulero konigis ke, laŭ peto de kapitano Capé farita la 14<sup>ma</sup> de januaro, « la ĉiurangaj militistoj havas permeson envicigi sin en la diversajn esperantistajn grupojn ».

Do, de tiu dato, ĉu ekster, ĉu en la kazernoj, ili povas sekvi kursojn.

Fakte, tiaj kursoj multobligas ĉiutage, kaj la jena vidaĵo, ŝuldita al nia sindona samideano, F<sup>ino</sup> Démarest, lerta fotografistino, ĝin montras plej sufiĉege.

Pri Esperanto kaj militaĵoj, ni citu 2 bonegajn artikolojn de leŭtenanto Bayol en la interesa revuo milita « ARMÉE & MARINE » (15<sup>a</sup> de Jan., 15<sup>a</sup> de Feb. — 40 cent. 9, Boulevard des Italiens, Paris). Ili estas tre dokumentitaj.

La dua, speciale dediĉita al Esperanto kaj Ruĝa-Kruco, komencas per kopio de la ĉapitra-kapo de nia artikolo pri tiu temo (Januaro 1907), kio pruvas ke « Tra la Mondo » estas nun estimata ne sole de la esperantista, sed ankaŭ de la nacia gazetaro.

Ni konigu, fine, ke S<sup>ro</sup> Carlo Bourlet, Prez. de la Pariza grupo, faris paroladojn en la superaj lernejoj milita kaj mara; kaj leŭtenanto Bayol, plurajn pri Esperanto kaj Ruĝa-Kruco ĉe diversaj specialaj societoj.

STELETO.

Kroniko.

Multe da niaj legantoj skribis al mi pri mia redaktora babilado, aprobante min speciale pro miaj diroj pri la novaj gazetoj.

S<sup>ro</sup> J. Jamin, nia distinginda kunfrato belga (el *Belga Sonorilo*) rememorigas ke, dum la Boulogna kongreso, jam frapita de la tro ofta malapero de gazetoj esperantistaj, li elmetis la opinion ke la gazetaro esperantista nur akceptu la jurnalojn apogitajn de financa helpanto, aŭ fundamentantajn sian regulan aperon sur alia kalkulo ol la nombro de siaj venontaj abonantoj.

La propono ne sukcesis ĉar, tiam, ekzistis nur — krom malmultaj esceptoj — revuoj propagandaj, t. e. *por Esperanto*, al kiuj la projekto ŝajnis malfacile aplikebla.

Sed nun la revuoj *per Esperanto* multobligas pli kaj pli. Tiom ilia sukceso estos bonega apogo por nia afero, tiom ankaŭ ilia malprospero — pro antaŭtempa fondo kaj manko de necesaj monaj rimedoj, — malfortikigos Esperanton.

La intereso de la lingvo kaj tiu de la monujo de la samideanoj estas do la samaj; kaj, de aliaj leteroj ankoraŭ, ŝajnas rezulto ke, denove, la afero estos konsiderata dum la Kembriĝa Kongreso.

Pri la komerca vidpunkto ankaŭ, mi ricevis sufiĉe da pripensoj. Kelkaj amikoj rimarkigas ke la esperantistoj ne estas riĉuloj kaj ke la devigaj elspezoj: kotizajoj, abono al la nacia gazeto k. t. p., deprenas de ili la tutan sumon disponeblan por Esperanto. Komprenable la diroj ne koncernas ilin: mi zorgis instigi, ke oni aĉetu la komercaĵojn je la marko Esperanto *plivole ol la aliaj*; sed, estas evidente ke, se oni ne aĉetas la *aliajn*, oni ne estas kulpa ĉar oni ne aĉetas la esperantistajn! se oni neniam manĝas ĉokoladon, trinkas viskion aŭ ĉampanon, oni ne estos riproĉata ĉar oni ne manĝas la ĉokoladon esperantistan, ne trinkas la viskion de nia amiko Buchanan aŭ la ŝaŭmantan vinon « Mirinda » de nia samideano Jadeau, tamen tre ŝatata de l' trinkantoj, da kiuj multe estas en lia regiono.



Fot. Démarest.

LERNANTOJ DE KAZERNA KURSO PRI ESPERANTO.

Estas ankaŭ juste diri ke la afero estas malsimpla kaj prezentas malfacilaĵojn. Pri ĝi mi ricevis spritan kaj interesan leteron de nia ĉarma kaj talenta kunlaborantino, F<sup>ino</sup> C. Oxenford, kiun ni enpresos pli poste.

S<sup>ro</sup> Fewings, la sindona propagandisto en Aŭstralio, kiu verkas bonegajn artikolojn por Esperanto en « The Brisbane Observer », al ni skribas:

« Mi ŝatas vian revuon treege kaj atendas ĝian monatan alvenon kun duobla plezuro: vida kaj spirita. Ĝiaj ilustraĵoj estas bonegaj kaj ĝiaj legaĵoj altiraj, tre interesaj kaj vere internaciaj. »

Kaj por montri alie ol per vortoj sian estimon por « Tra la Mondo », S<sup>ro</sup> Fewings al ni sendis tre kuriozajn dokumentojn pri sia lando kaj la enlanduloj, kiujn ĝuos niaj legantoj.

El letero de S<sup>ro</sup> Landry, Prez. de la grupo en Marquise, ni eltiras la jenon:

« Mi ricevis la nojn de « Tra la Mondo » pri la 2<sup>a</sup> kongreso. Mi deziras nun ricevi tiujn pri la 1<sup>a</sup>. Mi opinias, ja, ke tiuj noj taŭgos bonege por triobla propagando:

- Propagando por la estontaj kongresoj;
- Propagando por Esperanto;
- Propagando por « Tra la Mondo ».

Oni povos propagandi por la kongresoj precipe ĉe la esperantistoj; por Esperanto ĉe la neesperantistoj; fine por « Tra la Mondo » ĉe ambaŭ. »

Alia persono, F<sup>ino</sup> Dalglish el Glasgow, havas saman opinion pri la propaganda valoro de « Tra la Mondo ». Mendante malnovajn ekz. de la gazeto, ŝi skribas:

« Mi havas la ideon ke, lasinte ilin kun *ŝlosiloj* en kluboj, tio helpos por diskonigi Esperanton. »

Fine, pro la artikolo pri telefotografio kun portreto de Dr<sup>o</sup> Korn, nia antaŭlasta numero estis uzata kiel propagandilo apud kelkaj germanaj scienculoj kaj gazetoj.

Bona artikolo pri « Tra la Mondo » en « Review of Reviews ».

Tre favora raporto en « Le Petit Courrier de Madagascar », kies direktoro, S<sup>ro</sup> Engelhard, tre ageme batalas por nia afero. En la granda insulo ĝi bonege progresas dank' al la penadoj de kelkaj militistoj, inter kiuj kapitano Fortin.

« Le Courrier de Saône et Loire » et « Le Journal de Beaune » raportas regule pri « Tra la Mondo ». La lasta malfermis rubrikon titolitan *Tra la Mondo*, en kiu li konigas al siaj legantoj kuriozajn kutimojn diverslandajn, por kio « Tra la Mondo » liveras varian ŝtufon.

Jen bonega maniero montri la utilecon de Esperanto.

Ni dankas niajn kunfratojn « La Belga Sonorilo », « Suno Hispana », « L'Espérantiste », « The British Esperantist » kaj « Foto Revuo », kiuj longe kaj simpatie anoncis la aperon de nia enketo « Germana Esperantisto » kaj « Lingvo Internacia » ankaŭ diris kelkajn vortojn pri ĝi.

A. MONTROSIER.

## Tertremo.

Originalo de AMFITEATREV', rusa aŭtoro. (\*)

Mi ĵus, obeante al la konsilo Tiflisa, elektis por mi punkton de savo en pordoj elirejaj, kiam subite, por mia feliĉo, mi rigardis supren kaj ekvidis, ke super mia kapo tremas, pretaj por detruigi, ŝtupoj kaj haltiloj de l' parada ŝtuparo. Mi forgesis ĉian teorion, demetis flanken ĉiujn savajn entreprenojn krom la rapideco de miaj propraj piedoj, kaj per du saltoj mi aperis sur la strato.

La skuadoj de l' tero trankviligis; restis nur lula tremeto. La strateto bruis per ĝemoj kaj plorkrioj; kuradis vivantoj sen ĉapeloj, sen surtutoj, vesteŝiritaj virinoj — ĉiu en io ajn unuekaptita. La konstantinopolaj sinjorinoj hejme ne ĝenas sin pro la tuaĉeto: lacigitaj per varmeĝo, ili, dum la tutaj tagoj, kuŝadas en siaj malklaraj dormejoj, ĉe kiuj, kompreneble, ili zorgas nur pri unu aĵo: plej eble sin liberigi pri vestoj. Ĉar la tertremo okazis nemulte post tagmezo, vere brulega, oni povas facile prezenti al si, en kiel simplaj kostumoj ĝi trovis kaj elpelis la malbonsortajn belulinojn de Pera kaj Galato.

En ĝardeno *Aux petits champs*, kien kunkuris por savi sin la Pera societo, la plej konvenaj sinjorinoj estis la servistinoj, vendistinoj el magazenetoj, kelnerinoj el biertrinkejoj, t. e. la virinoj servantaj, devigataj esti frumatene vestitaj. Sed pri la sinjorinoj.. vere malfacilege estus imagi pentriston, kiu riskus gajigi la publikon per preciza prezento de tiuj ĉi grupoj ĉe la unuaj minutoj post la tertremo. Fine, troviĝis decidemaj homoj, kiuj kompatis la konfuzecon de la malfeliĉulinoj: ili eniris domojn, tremetantajn ankoraŭ kaj pretajn por fali pro nova subtera atako, prenis vestojn, tukojn, mantelojn, la unuajn, kiujn ili trovas, kaj kovris la malbonsortulinojn « Evojn kontraŭvolajn. »

Okazis ke la servistino de nia hotelo falis en miajn manojn tute sveninta; kaj mi ankaŭ, kontraŭvole iginte ŝia kavaliro, estiĝ devigita elkuradi el mallarĝa kaj danĝera strateto, savante ne nur mian propran personon, sed ankaŭ trenegante sesdek kilog., bone kalkulitajn, da senkonscia korpo. Ĝi, certe, haltigis videble mian trotkuron, kaj kredeble neniam punlaboristo iam tiel malbenadis sian puŝveturilon, kiel mi malbenis mian dikkorpan portafon. Envie mi rigardadis la dorsojn de miaj kunloĝantoj hotelaj, kaj aparte de mia hotelmastro kaj de la hotelservantaro: ĉi tiuj, senŝarĝaj, kuradis kun rapideco de kurĉevaloj. Jen, kiam mi praktike komprenis la signifon de « handikap' » (\*\*\*) de niaj sportistoj! Fine, mi altreniĝis ankaŭ ĝis la ĝardeno kaj demetis teren mian ŝarĝon... mi timas, kun pli malgranda singardemo, ol ordonas vere kristana humaneco: almenaŭ la dikkorpa fraŭlino tro rapide revekiĝis kaj komencis ĉirkaŭen sovaĝe rigardi palpante sin: ĉu mi ja viva estas, aŭ jam en alia mondo?...

Ĉirkaŭe vere estis sovaĝa senespero en ĉiuj gradoj, de svenoj ĝis histerika vidiĝo, de genufleksoj kaj preĝoj ĝis malbenado kaj blafemoj. La infanoj, mirinde, kondukis pli bone, ol la matur-

aĝuloj, same kiel dum maraskuado. La infanoj tre malofte suferas pro mara malsano kaj ofte, kiam tuta vaporŝipo jam, laŭ la volo de Neptuno, estas aliformigita en loko de ĝemado, vomado kaj malbenado, la infanetoj ludas sur la ferdeko, kvazaŭ nenio okazas. Renkonto kun Malteno servis al mi kiel firma apogilo dum traŭro meze de konvulsiaj vizaĝoj kaj ĉagrenaj sonoj, kaj savis min de ebla atako de paniko, sufoke reganta super la ĝardeno. Krom Malteno, kondukis sin sufiĉe trankvile advokato Petersburga. Sed lia trankvileco estis iel tremiganta, fatalista. Li staris sen ĉapelo, lia barbo estis disigita de l' vento, liaj okuloj brilis per fajro mistika. Ni ekkrietis al li. Li ektemis.

— Kiel eble estas scii — li balbutis, premaute mian manon, kaj respondante proprajn pensojn — eble, tio ĉi fariĝas pro mi...

— Kio do « pro vi »?!

— Konstantinopolo suferas!

Mi ekrigardis lin sovaĝe: videble mia kompatrioto (sampatrujano) freneziĝis pro teruro.

Li havis larmojn en la okuloj:

— Amiko mia, mi estas granda pekulo. Mi detruis mil sescentojn da edzecoj. Eble, Dio punas Stambulon nome pro tio, ke mi estas tie ĉi... pro mia ĉeesto malagraba al Dio.

— Bah! — mi rediris al la eksedzigisto — vi estas tro ema kredi vin pekulo. Tertremoj en Konstantinopolo ne okazis de kvarcent jaroj, kaj — trankviliĝu, mia kara, — tra tiu tempo okazis tie ĉi agoj, ne egalaj al la viaj! Ĉar la urbo ne falis sur la teron post diversaj Mahmedoj, Selimoj, Solimanoj kaj tiel plu... la logiko de Nemerido ne permesas, ke ĝi falu nur pro kaŭzo, ke vizitis ĝin rusa eksedzigisto kun bona klientaro...

Malrapide la amaso trankviliĝis. Histerikaj ĝemoj kaj korpoj senkonsciaj estis pli maloftaj. Kaj nelonge post la tragedio komencis montriĝi komedio kaj *vodevilo*...

Tie ĉi la aŭtoro rakontas komikajn epizodojn posttertremajn, kiujn ni tamen, kvankam ili estas interese priskribitaj, ne ripetos, por ke la rakonto ne okupu tro grandan lokon.

Priskribinte ankaŭ la terurajn rezultatojn de Stambula tertremo, li miras kiel rapide, post katastrofo, la loĝantaro revenas al la kutima vivo.

Se estas individuoj, al kiuj « teruro morta dum momentoj de tertremo estas kvazaŭ plej bona misiisto, preskaŭ plej forta rimedo kontraŭ ateismo kaj ŝanĝas ilian malvirtan vivon », pli ofte ĝi ne restigas impreson travivan. La aŭtoro rememoriĝas pri juna greko, kiu tuj post la katastrofo iradis tra ĵus detruitaj stratoj kaj vendadis laŭ kutimo al « sinjoroj fremduloj » pentrajetojn abomenindajn. Li forgesis tuje sian timon pro siaj ĵuroj...

La aŭtoro memoras tiuokaze pri karaktera ŝipisto el « Kandido » de Volter', kiu tuj post la Lisabona katastrofo tertrema faris multon da krimoj: rabis detruitan domon, ebriiĝis, adultis k. t. p.

(\*) Fino. Vidu la Januarajn kaj la Februarajn Numerojn. — (\*\*\*) Handikap (elp. handikap') signifas kurado kun aldonita pezo.


— Mia amiko — diris al li Panglos — agante tiel abomene, ĉu vi ne pensas, ke vi ofendas la Plej Altan Prudenton.

— Iru vi foren! — kriegis la ŝipisto, — mi, ho frato, naskiĝis en Batavio, trifoje veturis Japanujon,

trifoje malkonfesis tie Kriston, kaj trabatis la krucon per piedoj — jen vi trovis iun, por lin timigi per via Plej Alta *Prudento*!...

*Esperantigila de* LEO BELMONT (Polujo).  
Ano de 1<sup>a</sup> Lingva Komitato.

## Ĉirkau la Kembridĝa Kongreso.



PREĜEJO EN LA KOLEGIO DE S. JOHANO (1511).

Duonon de la ĉefa ora monero de la diversaj gravaj Eŭropaj nacioj ni elektis kiel kosto de la bileto. Kutime Kongresanoj pagas unu, kaj ne nur duonon sed ni decidis ke, se la Esperantistaro helpas nin, tiu malgranda sumo sufiĉos.

Angloj do pagos 10 s. Francoj, Belgoj, Italoj, Hispanoj, Aŭstroj, Serboj, Rumanoj, 10 fr. Germanoj 10 m. Rusoj 5 rub. Svedoj, Norvegoj, Danoj 10 kr. Amerikanoj 2 1/2 d. Holandoj 5 fl. k. t. p.

La tiel aĉetita bileto donos la rajton ĉesti ĉiujn oficialajn kunvenojn ĉe la Kongreso, partopreni en multaj ekskursoj pro malaltigita kosto, havi grandan rabaton je la fervojaj biletoj ĝis Kembridĝ, kaj, dum la Kongresa Semajno, estos akceptata kiel garantiaĵo de Membreco de la diversaj Klubo kaj Societoj, kiuj malavare proponas akcepti Esperantistojn, kaj, se la bileto estas aĉetita antaŭ Junio 15 la kongresano ricevos senpage la Kongresan Libron, kiun ni intencas eldoni proksimume tri semajnojn antaŭ la Kongreso.

Tiu libro estos tre utila kaj interesa verko, enhavante kiel eble plej definitivan programon de la diversaj festoj kaj ekskursoj, historieton kaj gvidlibron Kembridĝan, sciigojn rilate fervojajn vojaĝadon, Anglajn kutimojn, monervalorojn k. t. p., kaj ankaŭ aldonon de utilaj Anglaj frazoj, kun Esperanta traduko kaj fonetike elmontrataj laŭ Esperanta sistemo elpensita de Kolonelo H. K. Gordon.

*La Trio* do kore esperas ke ĉiuj samideanoj kune opinios, ke ni donos bonan valoron por kosto kiu ja ne devas esti tro por tiuj, kiuj deziras havi feliĉan semajnon, — eble tri ĉar ĉiuj Membroj povos partopreni en ekskursoj ĝis Aug. 26, — helpi Esperantan progreson kaj samtempe firme starigi niajn ĉiujarajn kunvenojn.

Ni denove konsilas, ke niaj amikoj kaj estontaj vizitantoj « Havu Fidon » ĉar ni vere ne preterlasos ian okazon por provizi grandan aron de tre interesaj festoj k. t. p., sed, kvankam la tempo estas jam iom frua, ni celos doni ian provizoran programon de la jam certigitaj festoj, kunvenoj kaj ekskursoj.

Sabaton Aug. 10 estos neoficiala tago, sed, pro la granda nombro de Esperantistoj kiuj jam estos alvenintaj en Kembridĝ, ni organizos senĝenajn kunvenojn diversspecajn.

Dimanĉon. Katolikaj kaj Anglapreĝejoj Diservoj, netrudaj promenadoj kaj vizitoj en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

Lundon. Oficiala akcepto de eminentaj Esperantistoj ĉe la Stacio post la alveno de speciala vagono ĉirkaŭ la 1.30 horo. Diversaj kunvenoj kaj Oficiala Malfermo de la Kongreso, pri kiuj detaloj poste aperos.

Ĉiumatene ĉe la Guildhall (Urbadomo) okazos la agadaj kunsidoj de la Kongreso. Post tagmanĝo specialistaj kunvenoj laŭ antaŭa aranĝo, multaj ĉiutagaj ekskursoj tre diversaj. Jaŭde granda ekspozicio de Britaj sportoj.

Ĉiuvespere Koncertoj kaj teatraĵoj, krom Merkredon, kiam okazos granda festo ĝardena. Vendredon, ni speciale klopodas pri Granda Balo kun Naciaj vestaĵoj, kaj ni nepre esperas ke ĉia ano venos ne fantazie sed nacie vestita, per vestaĵoj de la nuna tempo. Ni baldaŭ fondos naciajn komitatojn por helpi tiujn kongresanojn, kiuj ne scias kiamaniere ili devus sin vesti.

Inter aliaj aferoj, lia moŝto la Urbestro tre malavare esprimis sian deziron doni ian akceptan feston, kaj aliaj gravaj Aroj kaj personoj faris same.

Pri loĝado, Kembridĝ estas tre taŭga urbo pro tio ke la loĝejoj estas tre komfortaj kaj, en Aŭgusto kiam la studentoj estas for, ili estas ĝenerale neokupataj. Sed la mastroj kutime donas nur ĉambrojn kaj fruan matenmanĝon. Ni do aranĝas, ke la Grenvendejo, la plej vasta Kembridĝa konstruaĵo, fariĝos nia plej granda mangosalonco kaj ĉiutage de Lundo ĝis Vendredo tag- kaj vespermanĝoj tie estos riceveblaj pro malgranda kosto. Ĝis 800 personoj povos kune manĝi tie.

Ni ankaŭ trovos por tiuj amikoj kiuj ĝin petos, loĝejoj kaj ni intencas eldoni serion da kvitancoj kiuj valoros ĉe loĝejo por ĉambro kaj frua matenmanĝo, ĉe la Grenvendejo por manĝoj k. t. p., kaj tiel niaj amikoj evitos tre oftan ekzamenadon de mono.

LA TRIO POR LA TRIA.

# GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

## GELLE FRERES

Parfumistoj PARIS

La firmo korespondas Esperante.

### INTERNACIECO.

La katastrofo de Kingston, tiu pli nova de l' vaporŝipo Berlin, estis okazoj por manifestoj de internaciaj simpatioj. Pro tiu lasta, okazis — la 25<sup>an</sup> de marto — solena prezentado ĉe la «Comédie Française» (Teatro Franca Komedio) por la vidbinoj kaj georfoj de la germanaj geaktoroj mortintaj dum la ŝippereo.

Ne povanta ĝin ĉesti, la direktoro de Deutsche Rundschau sendis al S<sup>ro</sup> Briand, franca ministro de la Publika Instruado, sumon de 1000 fr. por pagi la luprenon de loĝio dediĉita al «la akademio junularo Francuja», kaj li skribis ke «la homaraj agoj maldisigas ĉiam la grandajn naciojn».

La sama sento inspiris la jenojn «pripensojn» de nia kunlaboranto E. Bacquet. Neniam oni tro parolos tiel.

Malgraŭ la konfuzo kiun mallertuloj aŭ malutilemoj volus enigi en la spiritojn pri la vorto «internacia» devige uzata por Esperanto; malgraŭ la diskredito kiun ili semas sur ĉiun provon celantan plinajbarigi la naciojn, konfuzante tiun celadon kun la teorioj de l' senpatrujuloj, la ideo de vivo internacia marŝadas; la animo internacia iom post iom akiras konsciencen pri l' estado. La pravo de tio konsistas el tiuj regnestraj gestoj al kiuj nun cedas la popoloj, tie ĉi por ĉesigi siajn interbatalojn kaj prepari pacigon, honorindan por ĉiu, en gastama urbo; tie, por prilabori estontan leĝaron de la ĉiulanda interkonsento kaj arbitracian ĵuĝistaron de la malpacoj; ne forgesante la geston imperiestran per kiu ministroj Westphali'aj antaŭ kelke da tempo ricevis ordenon pro kuraĝa elmonstro pri l' internacia solidareco. Ĉu tiuj diversaj gestoj ne signifas, ke homoj, eĉ apartigitaj de landlimoj, ne plu estas tiel fremdaj hodiaŭ kiel en la estinta tempo? Ke la vortoj fremda kaj barbara ne plu estas egalsencaj, same kiel en la antikvaj lingvoj, speciale la latina, ĉe kiu hortis tiom montris malamikulon kiom fremdulon?

Ĉu tamen oni ne povas timi, ke la animo internacia ensorbos iam, aŭ malfortigos, la animojn naciajn? Tiam demandon oni povus fari pri la animo nacia, de kiu estas ensorbitaj nek la provinca nek la familia animo. Eminentuloj, sincere patrujamaj, ekrevivigas hejme la animon provincan; ili ja opinias, ke la gloro de la granda patrujo kunligiĝas kun la gloro de la malgranda patrujo, tio estas, la provinco; ke tiu ĉi ne komprometas tiun; ke la granda patrujo nur fortiĝas per la amo de siaj filoj al la naska provinco, al ĝiaj moroj, pejzaĝoj, monumentoj, kostumoj kaj idiomo.

Reciproke la fortiĝo de la vivo nacia ne malhelpis provincan poeton (Mistral'on), kies patriotismo ne estas suspektinda, ke li rehonorigis la vivon, la kostumojn kaj precipe la lingvon de sia provinco; kaj tiel briligis ĝian literaturon per poeziaj verkoj, ke ĉi tiuj estis indaj je tiu premio Nobel, kiu baldaŭ, ni almenaŭ ĝin esperas, rekompencos la genian elpensiton de Esperanto.

Resume, provinca vivo, nacia vivo kaj internacia vivo aperas kiel tri stadioj en la evolucio de l' ideo de familio, kaj tiom longe ke tiu ĉi ne difektiĝos, la vorto internacia nenion havos kapablan prave malkvietigi iun ajn.

### La katastrofo de kirassĥipo «Iena».

Nova kaj terura katastrofo, ho ve! pravigas ankoraŭ tiujn pripensojn. La mondo konas la funebrojn, kiu nigre kravatis la francajn standardojn, frapante la nacion en siaj infanoj kaj en sia surmara potenco.

Ĉiuj nacioj, parlamentoj, geregnestroj, sendis al Francujo simpatiajn kondolencojn, kunigante sin, trans la landlimoj, en profunda sento de homaj solidareco kaj frateco.

Al la suferuloj de l' senkompata fatalo, al tiuj, kiuj sensanceliĝe sin ĵetis en la brulaĵo por plimalgrandigi la malfeliĉecon, ni sendas la ateston de niaj bedaŭroj, de nia malĝojo kaj de nia admiro.

### Por la Blinduloj: Novaj donacoj.

G. D. Buchanan (Skotlando) . . . . .	5 fr.
E. Bacquet (Francujo) . . . . .	5 fr.
L. de Guesnet (Francujo) . . . . .	1 fr.
Grupo de Beaune . . . . .	5 fr.
Sume . . . . .	16 fr.
Jam ricevitaj . . . . .	15 fr.
Kune . . . . .	31 fr.

La «Journal de Beaune» malfermis monpeton en siaj kolonoj, dank'al nia amiko Bord. Aliaj penadu al sama rezultato. Ĉiuj sumetoj estos danke akceptataj.

Interesa artikolo pri «Inter blinduloj» de l' bedaŭrata Doktoro Javal en «Internationalis Concordia», de nia bonega kunlaboranto Sam. Meyer. Oni scias ke tiu revuo, organo de la grava «Societo por studoj kaj korespondado internaciaj» fondita de Emile Lombard, enhavas regule ampleksan kronikon pri esperantaĵoj. Multaj el la 6500 anoj de «I. C.» estas esperantistoj.

## FERVOJOJ de PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE

Malfermo de Agentejo en Londono.

La Kompanio de la Fervojoj de Paris ĝis Lyon kaj Méditerranée ĵus malfermis en Londono W 179-180 Piccadilly, oficejon kiu liveras la fervojajn biletojn, notinde la poŝlibretojn por rondiraj vojaĝoj je laŭvolaj vojaroj sur la grandaj francaj fervojaroj, la internaciaj vojaĝoj; la biletojn por termalaj kaj banaj stacioj, k. a. ....  
La publiko trovos ĉe tiu Agentejo ĉiujn necesajn sciigojn pri la vojaĝaj kombinoj kaj la komercaĵa transporto.

## LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

46, rue Sainte Anne, Paris.

LA KATALOGOJ ESTAS RICEVEBLAJ SENPAGE.

### ESPERANTISTOJ

PASIGU LA SOMERON

EN

## Aix=les=Bains

(FRANCLANDO)

Sendu 30 centimojn al la  
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO  
kaj vi ricevos afranke la interesan broŝuron  
de D<sup>ro</sup> J. DARDEL, pri la termala kuracado  
en tiu urbo.

## ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,  
Oportuna, Pura,  
Neestingebla  
en Ventego,  
Funkciadas bonege  
nur kiam oni uzas  
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelanojn  
120.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn,  
kun lenso 5 kronojn,  
18 Kandelanoj kostas 1 1/2 kronojn.

SENDOTA ĈIEN DE

O. F. ASP, Kopenhage.  
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.  
General Agento: S<sup>ro</sup> G. RUTTER, 30, Red  
Lion Squar, LONDON.



### Ĉiu esperantisto legos kun plezuro «la KAPRINO de S<sup>ro</sup> SEGUIN»

deklamita ĉe l' E. Neuchatela. esp. festo. —  
Sendinte 20 centiman p. markon al S<sup>ro</sup> Yersin  
Pesceur (N<sup>o</sup> 1) Sois, vi ricevos tiun belan  
broŝuron. — 12 ekz. po fr. 1,50. Afranko plie.  
Tre rekomendinda por grupoj kaj kursoj.

# Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la  
Internacia Sciencia Oficejo Esperantista  
Genevo-Svislando.

Kelkaj originalaj artikoloj en la venontaj numeroj:

**Al nia Legantaro**, antaŭparolo de la nova redakcia komitato, pri la fondiĝo de *Sciencia Asocio Esperantista* dum la dua universala Kongreso, la kreo de *Internacia Sciencia Oficejo* en Genevo kaj la reorganizado de *Internacia Sciencia Revuo*.

**Pri surfacoj duaordaj komunfokusaj**, de R. Bricard, Parizo (Francujo).

**Du vortoj pri terminoj matematikaj kaj aritmetikaj**, de W. Ŝmurlo, Stuttgart (Germanujo).

**Pri la uzebleco de la fortoj de l' homo**, de André Broca, Parizo (Francujo).

**Deveno de la speco ĉe la papilioj**, de P. A. H. Muschamp (Anglujo).

**Artikoloj pri geodezio**, de V. Ŝulgin, Pskov (Rusujo).

**Pri la manko de internacia geofizika terminaro**, de E. Chaix, Genevo (Svisujo).

**La komplikeco pri la deveno de la tertremoj**, de Th. Tommasina, Novara (Italujo).

**Evolucio de la religia ideo**, de D<sup>ro</sup> Vallienne, Parizo (Francujo).

**Pri la hidrodinamika teorio de la « Seĉoj »** de Prof. Chrystal, Edinburgĥ, Skotlando.

**Nuna Stato de Internacia Bibliografio**, de J. Hanauer, Frankfurt a/M. (Germanujo).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jare, 7 frankoj, 6 markoj, 6 ŝilingoj aŭ 2,75 rubloj.  
Unu numero: 60 centimoj, 50 pfenigoj, 6 pencoj aŭ 25 Kopekoj.

Oni abonas ĉe la Sciencia Oficejo, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Review of Reviews* », Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

# Eksport=Jurnalo.

Internacia Revuo por Komerco, Industrio kaj Tekniko

Abonprezo: M 4. — internacie

Apero: ĉiumonate

Eksport=Jurnalo (E-J) estas la nomo de nova gazeto, kiu en mirinda maniero plifaciligas la internacian interŝanĝon de komercaĵoj kaj industriproduktoj per la uzado de la lingvo *Esperanto*.

Ĝi raportas pri la eksport kaj importaferoj de la diversaj landoj, pri la tutmonda foiro, priskribas novajn ideojn kaj elpensojn el la teknika kaj industria vivo, priparolas la ŝancojn de la komercaj geoficistoj k. t. p. k. t. p.

Ĉiu esperanto abonu E-J, ĉar

1) Li ricevas ĉiumonate sciigojn, kiuj havas rektan utilon por li,

2) Li havas la plej efikan propagandilon, ĉar li povas montri al ĉiu skeptikulo la praktikan valoron de Esperanto.

Postulu tuj provan numeron skribante la literojn E-J kun via plena adreso (tre legeble!) sur simpla poŝtkarto kaj adreso:

EKSPORT=JURNALO

Frankfurt aM Gulleutstrasse, 96.

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ  
eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ  
GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO:

Sen Literatura Aldono . . . . . 5 fr. »  
Kun Aldono . . . . . 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono: 2 fr. 50.

Administracio: Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Ilustritaj Presaĵoj

eldonitaj de la K<sup>io</sup> de l' fervojoj Paris-Lyon-Méditerranée.

Aĉeteblaj:

1<sup>o</sup> Ĉe ĉiuj stacidomoj, urboficejoj kaj staci-bibliotekoj de l' K<sup>io</sup>:

Gvidlibro-Horaro P. L. M. 0 fr. 50

2<sup>o</sup> Ĉe la bibliotekoj de l' ĉefaj stacidomoj:

La karto-vojaĝo de Marseille ĝis Vintimille kun notoj historiaj, geografiaj, k. e... pri la lokoj sidantaj sur la vojo. 0,25

La sekvantaj ilustritaj broŝuretoj, priskribantaj la plej interesajn regionojn traŝaratajn de la vojaĝo P. L. M.: Romaj konstruaĵoj kaj Mez-Epokaj urboj de l' vojaĝo P. L. M., Eldonitaj france, angle k. germane.

Monto-Blanka, Chamonix Same 0,25

Savoie-Svisujo. . . . . Se 0,25

Dauphiné Se 0,25

Rhône, de ĝia fonto ĝis la maro Se 0,25

La Lazura marbordo, multkolora broŝuro. . . . . Se 0,50

Auvergne . . . . . nur france 0,50

Corse . . . . . Se 0,25

Albumo el vidaĵoj de la vojaĝo P. L. M. . . . . 0,50

Albumo: Lazura marbordo, Corse, Alĝerujo, Tunisujo (kun poŝtkartoj) . . . . . 0,50

Albumo: Paris'a ĉirkaŭaĵo . . . . . 0,25

Albumo ilustritaj vojaĝoj:

Paris-Simplon-Milan . . . . . france k. angle 0,50

Paris-Lyon-Marseille-Lazura marbordo . . . . . Se 0,50

Paris ĝis Blanka-Monto . . . . . nur france 0,50

Albumo Monto-Cenis. . . . . 1,00

Tiuj dokumentoj estas poŝte riceveblaj laŭ peto sendita al la « Service central de l'exploitation P. L. M., 20 Boulevard Diderot, Paris », kaj akompanata de la pago, poŝtmarke. Aldoni 10<sup>c</sup> por la afranko.

# MIKSAĴOJ.

## “Tra Mez-Afriko,, de Komandanto Lemaire.

Mi jam diris la grandan impreson faritan dum la Ĝeneva kongreso de la parolado de Komandanto Lemaire.

Sed kiom da esperantistoj ne partoprenis en la plezuro de la ĉeestintoj! Por ili, por daŭrigi sian senĉesan kaj ageman propagandon, Komandanto Lemaire eldonis sian allogan rakonton laŭ modelo, kiun prave li nomas «la modelo de l' estontaj eldonajoj»: unuflanke la Esperanta teksto, aliflanke la nacilingva.

La parolado estas riĉega je interesaj ĉiuspecaj detaloj pri la vivado en la Mez-Afrika regionoj trairitaj kaj travivitaj de nia amiko: kiel oni tie instalas sin, kiel oni tie vojaĝas; kion oni povas manĝi kaj trinki, kion oni devas eviti. La volumo, tra kiu sin vidigas konstante alta sento pri la devoj de l' civilizitaj homoj kontraŭ la necivilizitaj: la «malbonaj nigruuloj» tiel utilaj, eĉ necesegaj por la vojaĝanto-blankulo, estas morala leciono je l'uzo de l' elsporangtoj.

Vere interesaj estas la paĝoj, sur kiuj la aŭtoro priskribas iliajn kutimojn, vivmaŭtieron, vestojn ofte pleje malkomplicajn, precipe ilian karakteron. Per la boneco, la dolĉeco, la pacienco, oni ĉion atingas kaj ricevas de ili. Kaj kia rekompenco, kiam oni povas glorigi sin, kiel Komandanto Lemaire, esti vivinta dum jaroj tra regionoj konsiderataj kiel sovaĝaj, ne pafinte unu solan militan kartoĉon!

Prave oni nomis lin la «Brazza» belga kaj tute juste; Generalo Sebert akcentas, en sia bela antaŭparolo por «Tra Mez-Afriko», tiun karakterizan trajton de la koloniiga verko de Komandanto Lemaire.

Ni aldonas modeste niajn gratulojn al tiuj de nia eminenta samideano.

A. MONTROSIER.

«Tra Mez-Afriko», fr. 2,75 ĉe «Tra la Mondo».

### REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1<sup>e</sup> Ĉiuj problemoj proponitaj kaj solvoj, amuzaj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo «Miksaĵoj». La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2<sup>e</sup> Krom esceptoj speciale direktaj la solvoj devas esti senditaj al S<sup>ro</sup> Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3<sup>e</sup> Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4<sup>e</sup> Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

### Solvoj de l' problemoj (2<sup>a</sup> kvaronjaro).

PROBLEMO IV<sup>a</sup> I B I S  
B A N T  
I N Ĝ E  
S T E P

PROBLEMO V<sup>a</sup> ripet' piret'

PROBLEMO VI<sup>a</sup> val' — ĉe = ĉeval'

PROBLEMO VII<sup>a</sup> as — korb — boraks' — rob — sak — K R (koro) — B A (boa')

PROBLEMO VIII<sup>a</sup> ĉar li estas SAT'ANO

PROBLEMO IX<sup>a</sup> pip' pir' pipr'

PROBLEMO X<sup>a</sup> p — i — p'

PROBLEMO XI<sup>a</sup> fum', muf'

PROBLEMO XII<sup>a</sup> pajlo, najlo, ajlo

Divenis: (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj).

Boitard	4	5	6	7	9	12
F <sup>no</sup> Allin	4	5	6	7	9	11
Ŝirjaev	4	5	6		9	12
Warden	4	5	6	7	9	11 12
Karulino		5	6		9	11 12
Peĉigargov	4		6		9	11 12
L. Holt					9	
Letenneur	4	6	7		9	11

Klasigo por la dua kvaronjaro kaj premioj.

Warden	50	poŝtkartojn propagandajn
F <sup>no</sup> Allin	30	»
Boitard	20	»
Peĉigargov	15	»

Mi lote montris F<sup>no</sup> Allin antaŭ Boitard kiu devenis ses problemojn — kaj Peĉigargov inter gedivenintoj de 5 problemoj.

Ĉiuj la gajnintoj estas petataj diri al mi kion mi devas fari per aŭ pri la gajnaĵoj.

### PROBLEMOJ SOLVOTAJ.

#### Problemo XXI<sup>a</sup> (DE BASTOUL).

Malbela sed utila besto mi estas; aldonu al mi literon mi fariĝas birdo.

#### Problemo XXII<sup>a</sup> (DE ŜIŜINET').

Mi estas vestaĵoj; iafoje faritaj per mi, intermiksita?

#### Problemo XXIII<sup>a</sup> (DE LA SAMA).

• • • • • bestoj  
• • • • • legomo vidata returnite  
• • • • • konjunkcio  
• • • • • dividilo  
• • • • • sen ĝi neniam oni povas fajfi

Oni legas la vortojn horizontale kaj vertikale.

Rimarko: la solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la 1<sup>a</sup> de Majo 1907<sup>a</sup>.

— Kien vi iras?  
— Menagerion (kvietigitabestmontrejo).  
— Ha! tie vi trovos mian edzinon kaj mian bopatrinon.  
10072.

— Sinjorino! oni ĵus mortigis vian edzon.  
— Dio pardonu la mortiginton.  
— Sinjorino, li ne mortis ankoraŭ tute; eble oni povos savi lin.  
— Dio mia, punu la kulpiĝinton.  
10072.

En la dudeka jaro, diras la fraŭlinoj: je kiu mi edziniĝos?  
Post la dudeka, ili diras: kiu edziĝos je mi?

A. — Kiel bedaŭrinde estas, ke vi ne ĉeestis en la hieraŭa teatraĵa vesperfesto. Kia senegala vespero!

B. — Tiom pli bedaŭrinde, vere, ke mi havas fortegan kataron de la nazo.

A — ???!

B. — Jes mia kuracisto ĵus diris al mi: «La Senegala vetero estas la plej efika kuracilo».

ROKSANO.

# Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la ricevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

## ESPERANTAJ ORGANOJ.

**Eho Esperantista.** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> H. Brühl, Unter den Linden, 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

**Eksport Ĵurnalo.** — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. — Jare 5 fr. (3 markoj Germaniuj). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M., Germanujo.

**Esperanta Ligilo.** — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille a sistemo. 3 f. — Ĉe S<sup>o</sup> Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

**Esperanto.** Duonmonata Internacia Gazeto. Tutmonda informilo. Diversnaciaj eldonoj; ĉiulandaj korespondantoj. Praktitaj informoj. Novaĵoj el la tuta mondo. Organo de la konsuloj kaj peresperantaj societoj. Aperas en ĵurnala formato. *La plej malkara! la plej ofta!* Jarabono: 3 frankoj. Unu numero: 10 centimoj. Direkcio: 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Svisujo. La unua numero aperis en Februaro. Oni nepre legu ĝin. Premioj al la legantoj.

**Espero Katolika.** — Tute Esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S<sup>o</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**Foto-Revuo Internacia.** — Ĉiumonata resumo de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la « Librairie photographique » Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

**Idealo.** — Organo de « Sicilia Federacio Esperanta »: Italuje, 2 fr. alilande, 3 fr. Corso Catalafimi, 495 Palermo (Italujo).

**Juna Esperantisto.** — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Blvd St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

**Lingvo Internacia.** — Monata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencigo de ĉiu monato.

**Socia Internacia Revuo.** — Internacia redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e (France).

## PROPAGANDAJ ORGANOJ.

**The American Esperanto Journal.** — Oficiala organo monata de la « American Association ». Angle kaj Esperante. Propagando kaj literaturo. — Jare 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U. S. A.)

**Amerika Esperantisto:** Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: 1/Amerika Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

**Antaŭen Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La Belga Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliiras duonmonate. Abono: 6 fr. jare. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique). La abono komencas nepre la 1<sup>an</sup> de Septembro.

**The British Esperantist.** — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu.** — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. — Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

**Centrameriko Esperantista.** — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abril, 8<sup>a</sup> Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

**L'Esperantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Sönderbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N<sup>o</sup>: 35 cent.

**Esperanto.** — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

**Germana Esperantisto.** — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. Jarabono, 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

**Helpa Lingvo.** — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kron. Admin. ĉe F<sup>ino</sup> G. Münster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante. — kun ilustraĵoj. Jarabono. 2 fr. 60 — N<sup>o</sup> 1<sup>a</sup>, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

**La Pioniro.** — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm.: Hon<sup>a</sup> Sek<sup>o</sup> de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S<sup>o</sup> « Espero. »

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (España).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEMJAJ ORGANOJ.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**Le Cycliste.** — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D<sup>ro</sup>: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

**De Lusthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝiekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj.

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

**La plume Sténographique de France.** — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>ro</sup>: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. *Petu specimenon.*

**Il Cittadino Italiano.** — Itala familia gazeto. Via della Posta, 16. Udine.

## Nekomercaj anoncoj.

1 fr. 25 po 4 linioj 33-literaj. Ĉin plua linio: 25 c.

32. L. de Guesnet, sporta redaktoro de « Tra la Mondo » verkanto de la Kroniko en Esperanto de *Tous les sports*, organo oficiala de la unuigo de la societoj francaj de sportoj atletaj, petas helpen de ĉiuj sportuloj por traduko de la sportaj esprimoj, 9, R. Chauveau-Lagarde, Chartres, France.

33. S<sup>o</sup> J. H. Salomon, fondinto de K. K. K. (korektada korespondanta klubo) loĝas nun je la jena adreso: 17, Pennywern Road, Earls Court, London S. W. (Anglujo). Oni petu al li sciigojn.

34. V. Reichelt, Dresden, Lebnitzer st. 32 ŝanĝas ĉiulandajn leterojn.

## Malgranda korespondado.

Sroj Svaĉina, David, Julesj Contencin, W. Page, F<sup>ino</sup> Gunzburg. — Dankon por viaj interesaj sendaĵoj.

— Ni deziras ricevi kelkajn ekz. de la Maja N<sup>o</sup> (1906aj.) de « Tra la Mondo » se, ne difektitajn. Ni pagos ilin 1 fr. Oni faru proponojn.

## Turista propagando.

Jam kelkaj progresemaj turistaj organizacioj preparas la someran sezonon uzante Esperanton. Ni rememorigu la beletan gvidlibron de niaj amikoj, fratoj Hopf: « Tra Berna Oberlando » kies malkara prezo, 50 c., ebligas facile la akiron.

## Tutmonda Poŝkalendaro.

La firmo Esperanto Verlag Möller et Borel, Berlin, preparas tutmondan esperantistan Poŝkalendaron por la venonta jaro. La redaktoro, nia amiko J. Schroeder, Wien, VII. Kaiserstrasse 10, akceptos plezure proponojn aŭ dezirojn de la esperantistoj por tiu celo.

Anoncoj estas jam akceptataj de la eldonistoj. 95. Prinzenstrasse, (Berlin).

EUGÈNE MONTROSIEK, Gérant. — A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.